

EL POPOLO CINIO

中國報週

11 1986





Esperantistinoj de Ĉinio kaj Japanio

Enhavo

LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Granda idealo kaj granda praktiko	2
Granda kaj celebrinda afero	4
Esperanto — tutmonda fenomeno	6
Grandioza manifestacio de Esperanto	9
Signifaj programeroj	14
Facetoj de la 71-a UK	18
Ĉinaj esperantistoj en UK	22
Kiel ilin impresis la 71-a UK en Ĉinio?	25
Kuraĝigo kaj espero	28
Interkompreniĝo, paco, evoluo (Kolora bildoserio)	29
Ĉina gazetaro kaj UK	48
Sun Jatsen, granda revolucia pioniro de Ĉinio	52
Vojaĝo en Fuĝjan (I)	56
Vojo de memlernantoj	60
Ilia aspiro	62
Luciano Pavarotti en Pekino	64
KURANTAJ AFEROJ	66
Internacia simpozio en Tokio	69
ESP-NOVAĴOJ	70
Periodaĵoj de Ĉinio	72
SUR LA KOVRILO: Kongresanoj sur la Granda Muro	
INTERNE DE LA KOVRILO: Esperantistinoj de Ĉinio kaj Japanio	
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Esperantistetoj	
SUR LA DORSKOVRILO: Afiŝo por la 71-a UK	


JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					



HUANG HUA*:

GRANDA IDEALO KAJ GRANDA PRAKTIKO

— SALUTVORTOJ AL LA INAŬGURO DE LA 71-A UK



Huang Hua salutas la kongreson.

Estimata sinjoro Prezidanto,

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Mi estas tre ĝoja ke mi hodiaŭ povas ĉeesti la solenan inaŭguron de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto kaj saluti vin.

Bonvolu permesi al mi esprimi, en la nomo de s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj Alta Protektanto de

ĉi tiu kongreso, kaj en mia propra nomo, kiel prezidanto de la Honora Komitato de la kongreso, varman gratulon al la kongreso, sinceran bondeziron kaj koran bonvenigon al diverslandaj geamikoj, ĉeestantaj la kongreson.

Malgraŭ tio, ke mi bedaŭrinde ne lernis Esperanton, mi plene konscias pri tio, ke Esperanto mem estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolviĝo plene montras ĝian fortan vivipovon. Tiu ĉi solena kongreso kun pli ol 2 000 partoprenantoj el diversaj partoj de la mondo estas ĝuste inspira ekzemplo. Antaŭ nelonge, en sia 23-a Ĝenerala Konferenco, Unesko aprobis rezolucion pri festado de la centjariĝo de Esperanto. Ankaŭ tio pruvas, ke pli kaj pli da homoj konsciiĝas pri la signifo de Esperanto kaj komprenas ĝian rolon, kaj Esperanto mem ricevas ĉiam pli vastan internacian agnoskon.

La ĉina popolo havas longan tradicion en la amo al Esperanto. Tiel frue kiel tuj post la Revolucio de 1911, fama ĉina demokrato kaj pedagogo Cai Yuanpei jam iniciatis, kiel la tiama ministro de edukado, ke Esperanto disvastiĝu tra Ĉinio; poste, granda pensulo kaj literaturisto Lu-sin, granda historiisto kaj literaturisto Guo Moruo kaj eminenta verkisto Mao Dun estis entuziasmaj subtenantoj de Esperanto en nia lando. La forpasinta s-ro Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR, same kiel s-ro Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, mem estis esperantisto. Pere de Esperanto ili konigis al Ĉinio eminentajn verkojn de alilandaj literaturoj. Ne nur tio, sed ili ĉiam fervore aktivadis por la Esperanto-movado.

Ekde la 30aj jaroj, la Esperanto-movado de Ĉinio kunfandis sin en la batalon de la ĉina popolo por nacia liberigo kaj ludis en ĝi sufiĉe grandan rolon. Sekve de tio, post la fondiĝo de

KONGRESO DE ESPERANTO

nia popola respubliko, la registaro de nia lando donis jam dekomence diversflankan subtenon al Esperanto. Ĝuste en tia historia fono, nia marŝalo Chen Yi, unu el la eminentaj gvidantoj de nia lando, faris en 1963 proponon pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en nia lando. Kaj jen, hodiaŭ realiĝas lia longevida kaj sagaca iniciato! Tio tute ne estas hazardo. Tio estas rezulto de senĉesa laboro de nialandaj esperantistoj dum dekoj da jaroj.

Sincere dirite, nia kontribuo al Esperanto estas nek tiel granda nek impona, kiel lando kun vasta teritorio kaj multa loĝantaro, kia la nia, devus fari. Ĉinio havas pli ol miliardon da loĝantoj, preskaŭ kvaronon de la tutmonda loĝantaro. Nia lando, kompreneble, devas fari pli multe da kontribuoj al la homaro, kaj ankaŭ al la granda idealo de Esperanto.

La kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo" estas ege trafa, ĉu kiel omaĝo al la Internacia Jaro de Paco, ĉu kiel atentigo pri la aktuale urĝaj problemoj de la homaro.

Oni tamen ne rajtas pretervidi, ke la nuna mondo ne kvietas, kaj milita minaco regas super la popoloj. Sed aliflanke, estas necese emfazi,

ke la pacaj fortoj de la mondo vigle kreskas, kaj tio estas frukto de la luktado de diverslandaj popoloj por defendi la pacon. Tiu luktado ampleksas ankaŭ la grandan strebadon de diverslandaj esperantistoj. Ekde sia naskiĝo Esperanto ligiĝas kun pacaj idealoj. Ĉiujare la Kongreso de Esperanto tial estas solena manifestacio de la paca potencialo de esperantistoj. Tia estas precipe la ĉi-jara, kiu estas aparte signifa kiel unu el la gravaj aktivadoj en la Internacia Jaro de Paco.

Kiel konate, nia lando praktikas pacan diplomatian politikon de sendependeco kaj memdecido. Ni ĉiam opinias, ke la landoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, sen konsidero pri la socia aŭ politika sistemo, povas kaj devas disvolvi rilatojn de komuna harmonio kaj amika kunlaboro surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto. Mi estas konvinkita, ke tiaj politiko kaj kredo de nia lando respondas al la Zamenhofa spirito, sekvata de ĉiuj pacamaj esperantistoj.

Por sin modernigi, nia lando praktikas pordmalferman politikon. Tia politiko koncernas ĉefe, sed ne nur la ekonomion. En la lastaj ja-

(Daŭrigo sur p. 5)


Huang Hua (la tria de maldekstre) intervidiĝas kun eksterlandaj diplomataj reprezentantoj, kiuj partoprenas la inaŭguron.



GRANDA KAJ CELEBRINDA AFERO

— PAROLO ĈE LA INAŬGURO DE LA 71-A UK

de CHU TUNAN*



Chu Tunan salutas la kongreson.

Estimata sinjoro Prezidanto,
Karaj gesamideanoj,

Hodiaŭ inaŭguriĝas la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi tre ĝojas, ke mi povas ĉeesti en la inaŭguro, kiel vicprezidanto de la Honora Komitato de la Kongreso, kaj prezidanto de la Societo "Amikoj de Esperanto" de Ĉinio.

La Societo "Amikoj de Esperanto" de Ĉinio konsistas el eminentaj personoj de diversaj vivosferoj. Inter ili troviĝas scienculoj, literaturistoj, artistoj, sociaj agantoj kaj aliaj famuloj. Ili havas altnivelajn sciojn, ĝuas socian renomon kaj povas vaste influigi en la amasoj. Ĉiuj membroj de la Societo, kvankam nur kelkaj el ili lernis Esperanton, bone scias, ke la lingva diverseco estas forta baro kontraŭ la homa progreso. Por forigi tiun ĝenon necesas internacia lingvo. La centjara historio de la internacia Esperanto-movado pruvis, ke Esperanto entenas la altan idealon de la po-

poloj el ĉiuj nacioj en la mondo por harmonie kunekzisti, interkompreniĝi kaj kune krei feliĉan vivon. Ni do povas diri, almenaŭ rilate al nia amo al Esperanto, ke ankaŭ ni estas samideanoj de la tutmonda esperantistaro. Tial mi, en la nomo de "Amikoj de Esperanto", esprimas varman saluton al la kongreso kaj amikajn sincerajn bondezirojn al vi ĉiuj, venintaj el diversaj landoj!

Kiel sincera amiko de Esperanto, mi ĉiam kore esperas, ke ĝi estos popularigita kaj uzata en pli kaj pli vasta tereno kaj fine, en ne tre malproksima estonteco, estos ĝenerale agnoskita internacie. Lastatempe Unesko aprobis specialan rezolucion, pozitive taksante la sukcesojn de Esperanto en la internaciaj kulturaj interŝanĝoj kaj akcelado de interkompreniĝo de diverslandaj popoloj. Ĝi alvokis, ke la ŝtatoj-membroj en konvena maniero festu la 100-jaran jubileon de Esperanto. Pri tio mi sentas fortan ĝojon. Tio estas dolĉa frukto akirita de la tutmonda esperantistaro, precipe de UEA, post seninterrompa penado. Kaj aliflanke, el tio montriĝas, ke Esperanto kune kun sia rolo ricevas pli kaj pli altan takson de tiu internacia organizo, ke ĝi mem marŝas decide al la celo esti agnoskita internacie.

Ekde sia enkondukiĝo en Ĉinion, komence de la kuranta jarcento, Esperanto ĝuas ĉiam altan ŝaton de la ĉina popolo, ne nur kiel lingva fenomeno, sed ankaŭ kiel espero kaj idealo. Jam ĝeneralan laŭdon ĝi rikoltis dank' al sia kontribuaĵo dum dekoj da jaroj al la movado de nova kulturo kaj nacia liberiĝo de la ĉina popolo. Estas

* Chu Tunan estas vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR, vicprezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK kaj prezidanto de "Amikoj de Esperanto".



Chu Tunan (dekstre) en la kongreso

do vere granda kaj celebrinda afero, kiel por la ĉina esperantistaro, tiel ankaŭ por la kulturaj rondoj de Ĉinio, ke ĉi-jare okazas en nia lando la grandioza kongreso de Esperanto. Kiel subtenanto de Esperanto, mi sincere deziras, ke ĉi-foja kongreso forte stimulu la Esperanto-movadon kiel en Ĉinio tiel ankaŭ en la tuta mondo! La brilaj sukcesoj de la nuna kongreso enskribiĝu en la historion de la internacia Esperanto-movado! Kaj Esperanto, kreita de Doktoro Zamenhof kun bona intenco kaj nobla idealo, fine fariĝu komuna internacia lingvo en komunikado de pensoj kaj sentoj de la homaro, kaj ĝi donu gravan kontribuon al defendo de la mondpaco kaj al la progreso de la homaro, sekve de senĉesa disvastiĝo kaj plifirmiĝo de la Esperanto-movado!

Dankon!

(Daŭrigo de p. 3)

roj nia lando atingis fortan disvolviĝon de la interŝanĝo de scienco, tekniko, kulturo, literaturo, arto ktp kun aliaj landoj. Tiaj interŝanĝoj ankoraŭ estas pli vastiĝantaj.

En la nuna mondo ĉiaj sciencoj kaj teknikoj rapide evoluas. Akcelado de tutmonda interŝanĝo en sciencoj kaj tekniko jam fariĝis la nepre necesa kondiĉo por la evoluo kaj progreso de la homaro. Esperanto kiel internacia komunikilo devas kaj povas ludi sian pozitivan rolon sur tiuj kampoj.

UEA decidis okazigi en Ĉinio ĉi tiun imponan kongreson antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto. Tio estas ekstreme granda konfido al nia lando kaj al la ĉina Esperanto-movado. Por ne vanigi la esperon de la tutmonda esperantistaro, LKK faris grandan kvanton da laboro. Mi elkore esperas, ke la kongreso disvolviĝos glate kaj plene sukcesos.

Mi deziras al la diverslandaj geamikoj sanon kaj agrablan restadon en nia lando.

Koran dankon!

** Huang Hua estas vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK.*

ESPERANTO – TUTMONDA FENOMENO


— Intervjuo al Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, la 31-an de julio 1986

Raportisto de EPĈ: Sinjoro prezidanto, mi estas Liu Caisheng, raportisto de la redakcio de El Popola Ĉinio, mi volas scii, kian impreson vi havas pri la 71-a Universala Kongreso de Esperanto.

Tonkin: Estas certe malfacile scii kiel komenci. Kion oni povus diri pri tiom da travivaĵoj. Eble mi diru, ke estas tri aferoj, kiuj impresas min tute aparte pri la kongreso. La unua estas la grandeco de tiu ĉi kongreso. Ĝi estas la plej

granda kongreso, kiun ni havis ekster Eŭropo en la tuta historio de Esperanto. Ĉi tie estas reprezentantoj de amaso da landoj, de kiuj ni relative malofte ricevas vizitantojn ĉe niaj kongresoj. Due, mi menciigu la gastigon, kiun ni ricevas ĉi tie. Mi malofte ĉeestis kongresojn, en kiuj oni ricevis tiom da atento flanke de la gastiganta lando. Trie, estas tute klare, ke ja Ĉinio estas evoluanta lando. Tio kompreneble signifas, ke estis jen

kaj jen kelkaj teknikaj malfacilaĵoj en organizado de la kongreso. Sed mi estas forte impresita de tio, ke oni tre rapide ellernas kiel solvi tiujn problemojn. Malgraŭ la grandeco de la kongreso, ĉio tre bone iras. La kongresanoj fakte estas tre kontentaj, mi kredas, pri tiu ĉi kongreso. Mi aldonu, ke oni ne povas tute apartigi la impresojn pri la kongreso disde la impresoj pri la kongreslando. Se temas pri la kongreslando, por multaj el



D-ro Humphrey Tonkin (la tria de maldekstre), prezidanto de UEA, Chen Haosu (la dua de maldekstre), vicurbestro de Pekino, kaj Zhang Qicheng (la unua de maldekstre), ĝenerala sekretario de ĈEL.



EPC-raportistoj intervjuas bulgarajn samideaninojn.

ni, ekzemple mi mem, kiu antaŭe neniam estis en Ĉinio, la sperto, kiun ni havas ĉi tie, estas vere viva sperto. Mi estas forte impresita de tiu ĉi lando, kaj de la progreso, kiun vi faras ĉi tie sub vere ege malfacilaj cirkonstancoj.

R: Sinjoro, antaŭ la komenco de la Pekina kongreso vi certe atendis ion de ĝi. Nun kvankam la kongreso ankoraŭ ne finiĝis, tamen ĝi jam proksimiĝas al la fino. Ĉu vi povus antaŭvidi kiujn fruktojn rikoltos nia kongreso?

Tonkin: Mi opinias, ke ĝi certe donos impulson al Esperanto en tiu ĉi parto de la mondo. Mi pensas ne nur pri Ĉinio, sed ankaŭ pri aliaj landoj de orienta Azio. Tio estas unu granda frukto. Dua frukto estas plia pruvo pri la tutmondeco de Esperanto. Tro ofte oni konsideras Esperanton eŭropa fenomeno. Ĝi vere ne estas eŭropa fenomeno. Ĝi estas tutmonda fenomeno. Kaj estas ege grave, ke ni ĉiuj ankaŭ ene de Esperanto-movado komprenu tion. Tiu ĉi kongreso helpas pruvi tiun fakton. Trie, la kongreso estas ankaŭ lernejo. Ĝi estas lernejo por

tiuj, kiuj organizas ĝin. Ĝi estas ankaŭ lernejo por tiuj, kiuj partoprenas ĝin. Ili ĉi tie konatiĝas kun la tutmonda Esperanto-movado kaj per tio fariĝas pli informitaj kaj pli kvalifikitaj kiel Esperanto-organizantoj. Tiu certe estas frukto, kiu daŭras dum venontaj jaroj. Fine mi aldonu ankaŭ la fakton, ke la nuna jaro estas la 99-a jaro de la lingvo Esperanto. La Pekina kongreso estas kvazaŭ malfermo al la jubilea jaro.

R: Sinjoro, ĵus vi jam iom menciis pri la diferenco inter la

pekina kongreso kaj la pasintaj. Ĉu aliajn diferencojn vi trovis inter tiuj kongresoj?

Tonkin: La homa konsisto de la kongreso. La kongresanoj ĉi tie dividiĝas klare en du grupojn. Estas tiuj, kiuj estas en Ĉinio por laboro por UEA kaj Esperanto. Estas ankaŭ tiuj homoj, kiuj sekvas ĉiujn kulturajn kaj turismajn programojn de la kongreso, sed ne vere la laborajn elementojn de la kongreso. Tio estas iom bedaŭrinda fakto. Kompensas ĝin tamen la nekutima nivelo de entuziasmo. Mi menciis, ke por multaj homoj ĉi tiu estas ilia unua kongreso. Ĝi estas unika sperto por ili kaj afero, kiun ili volas ekspluati (en la plej bona senco de tiu vorto) ĝis maksimumo. Multaj el tiuj unuaj kongresanoj estas ĉinoj. Oni certe ne povas diri, ke ĉi tiu kongreso estas rutina kongreso.

R: Sinjoro, vi estas prezidanto de UEA nove elektita kaj la unua vicprezidanto pasinta. Vi certe multe atentis pri la ĉina Esp-movado. Nun vi persone venis al nia lando, ĉu vi volus konigi al ni, kiujn

En la kongresejo





Laboras helpantoj.

rimarkojn vi havas pri la ĉina Esp-movado?

Tonkin: Mi sentas min iomete en embaraso, ĉar vi estas plej bonaj juĝantoj pri via propra movado. Mi tamen menciis unu evidentan problemon: la izolitecon de la ĉinaj esperantistoj. Tiu izoliteco estas evidenta en la parola nivelo de la lingvo. Estas ankaŭ multaj kongresanoj ĉi tie, kiuj antaŭe neniam komuniĝis kun eksterlandano. Ili devas multe lerni simple pri la parola aspekto de la lingvo. Estas ankaŭ multaj komencantoj, kaj vi certe havas malfacilaĵojn trovi bonajn instruistojn por tiuj komencantoj por ke ili lernu la lingvon. Mi opinias, ke vi devus ĉion fari por produkti bonajn lernilojn pri Esperanto. Mi parolas ĉi tie ne nur pri lernolibroj sed ankaŭ, kaj eble precipe, pri sonbendoj por ke la homoj povu aŭdi la lingvon. Kaj mi ankaŭ sugestis, ke estus bone starigi pli multajn kontaktojn kun esperantistoj en aliaj landoj,

kio ebligas al viaj lernantoj praktike utiligi la lingvon. Plia punkto: mi multe interesiĝas pri eventuala kontribuo de la ĉina Esp-movado sur la kampo de scienco kaj tekniko. Vi havas ĉi tie multajn esperantistajn fakulojn, kiuj el la sperto de evoluanta lando povus helpi nin direkti nian energion al tiuj homoj, kiuj deziras praktike utiligi nian lingvon kaj kiuj bezonas teknikajn kaj sciencajn verkojn, kiuj nuntempe mankas en la Esperanto-movado. Al tio mi aldonu ke la kontribuo de la ĉina Esperanto-movado al la internacia movado en pasintaj kelkaj jaroj estas vere grandega — per via eldona aktiveco, per via bela revuo *El Popola Ĉinio* kaj ankaŭ per viaj radio-programoj.

R: Sinjoro prezidanto, vi unuafoje vojaĝis al nia lando. Mi estus tre ĝoja, se vi konigus al mi viajn impresojn kaj opiniojn pri via antaŭkongresa vojaĝo.

Tonkin: Kiel vi scias, usonanoj, kiam ili volas fari ion novan, ĉiam unue legas novajn librojn pri ĝi. Kaj do mi legis kelkajn librojn pri Ĉinio. En la unua libro oni diris: “Kiaj ajn estu viaj antaŭjuĝoj aŭ viaj supozoj pri Ĉinio antaŭ la vizito, vi povas esti certa, ke ili renversigos.” Efektive tiel estis. Mi ja venis al la lando kun diversaj ideoj pri la karaktero de Ĉinio, sed fine ĝi montriĝis tute alia. Ĉinio tute surprizis min. Ĝi montris al mi kiel sencia mi estas. Ekzemple, mi iomete legis pri Ŝĵian, unu el la urboj kiujn ni vizitis. El tiu legado mi unue eksciis pri la graveco de tiu urbo en la monda historio. Kelkajn semajnojn antaŭ mia ekiro al Ĉinio mi estis petita, en mia rolo kiel edukisto, fari recenzon pri nova kurso, kiun oni planas por instruistoj ĉe ni. Temas pri kurso pri la disvolviĝo de la urba vivo en la mondo. Ĉinion oni ne menciis. Sed nun mi scias, ke en la historio de urboj, Ĉinio staras en la unua rango. Mi insistos, je mia reveno, pri ŝanĝoj en la kurso. Mi vidis aferojn kaj en Ŝĵian kaj en Nankino, kie mi ankaŭ estis, kiuj estis por mi tute novaj spertoj. Mi ankaŭ ne atendis, ke mi havos tiel malfermajn diskutojn kun ĉinoj pri la situacio de via lando. Tio ankaŭ forte impresis min. Tio ĉi estas lando, kiu havas tiel multajn lecionojn por instrui al la homoj, kaj estas samtempe preta lerni de aliaj. Ankaŭ tiun fenomenon mi multe admiras.

R: En la nomo de la redakcio de *El Popola Ĉinio* mi elkore dankas vin pro via parolado.

GRANDIOZA MANIFESTACIO DE ESPERANTO

de DA ŬEJ

La 71-a UK solene okazis en Pekino, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986.

Tio estis la plej granda internacia kunveno por Ĉinio. 2 000 esperantistoj el 54 landoj kaj regionoj kolektiĝis en Pekino, fama antikva kultura urbo ĉe la Gran-

taŭrbo de Pekino aspektis aparte impona. Okulfrapis horizontala rubando kun vortoj "71A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO" Flirtis en venteto verdstela standardo kaj diverskoloraj flagoj. La medio estis saturita de festa etoso.

do per ĉi tiu majesta manifestacio fermas la unuan jarcenton de la Internacia Lingvo kaj inaŭguras la tutmondan prifestadon de la 100-jariĝo de Esperanto. Estas aparte konvene, ke ni komencas tiun novan etapon per ĉi kongreso, kies ĉeftemo estas 'interkompreniĝo, paco, evoluo'. Tiuj tri vortoj, tri nocioj esprimas la tutan esencon de la agado por la Internacia Lingvo". Li diris, ke tiu ĉi kongreso okazas en unikaj cirkonstancoj, nome en la centro de riĉa kaj tre specifa kulturo. Ĝi donis bonan ŝancon por kultura interŝanĝo inter Oriento kaj Okcidento. Ĉe la fino de sia parolo li diris: "Mi fieras pro la anonco de la malfermo de la ĝis nun plej multnombra ekstereŭropa Universala Kongreso. Ĝi elokvente markas la rapide progresantan internacian signifon de niaj kongresoj."



Sur la podio de la inaŭguro

da Muro. Per la sama lingvo ili batalis por amikeco kaj paco, kio enskribis brilan paĝon en la historion de la Internacia Lingvo antaŭ ĝia centjara jubileo.

Pekino estis en agrabla somero. La naturo favoris la Universalan Kongreson per belaj veteroj. La 27-an de julio la Ĉina Teatro en la okcidenta an-

Je la 10-a atm. solene inaŭguriĝis la 71-a UK, prezidata de s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

Kun granda ĝojo li deklaris, ke la 71-a UK estas "unu el la plej grandaj Universalaj Kongresoj. Ĝi estas la plej granda Esperanto-manifestacio ekster Eŭropo. La internacia Esp-mova-

Poste parolis Chen Yuan, vicprezidanto de LKK kaj vicprezidanto de ĈEL. En la nomo de LKK kaj ĈEL li varme bonvenigis la kongresanojn el diversaj landoj. Li kore dankis la ĉinan registaron, personojn de diversaj ĉinaj socitavoloj kaj gesamideanoj de diversaj landoj pro iliaj varmaj subtenoj. Li montris, ke "pro tio, ke Ĉinio estas evoluanta lando, kaj krome LKK ne havas sperton organizi kongreson, la kongresanoj certe trovos iun aŭ alian nekontentaĵon en vivo. Mi kredas, ke vi ne tro multe plen-



Kongresanoj

dan ĝojon, ke lastatempe Unesko aprobis rezolucion pri Esperanto. Li opiniis, ke tio montras, ke Esperanto solide marŝas al la celo esti agnoskita internacie.

En la inaŭguro parolis sinsekve Chen Haosu, vicurbestro de Pekino, diplomatoj de multaj landoj en Ĉinio kaj Liu Xiliang, vicdirektoro de Radio Pekino.

S-ino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, voĉlegis la gratulan telegramon de Hu Qiaomu, honora prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, kaj gratulan leteron de Bakin, fama ĉina verkisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

En la inaŭguro d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, faris brilan traktadon pri la kongresa temo "interkompreniĝo, paco, evoluo".

La inaŭguro puŝis la programerojn de la kongreso al alta tajdo.

La pli ol 100 programeroj kaj kunvenoj okazis ĉefe en la Pekina Scienca Halo en la kvieto okcidenta antaŭurbo de Pekino. Ili plejparte estis okazigitaj de Esp-organizoj de poŝtistoj, tele-

dos pri tio, ĉar ni esperantistoj jam de antaŭ 99 jaroj estas senlacaj batalantoj, kiuj havas memfidon venki ĉiajn malfacilaĵojn!"

En varma aplaŭdado ekparolis Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko. Li salutis la kongreson en la nomo de Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj Alta Protektanto de la 71-a UK, kaj en sia propra nomo, kiel prezidanto de la Honora Komitato de la kongreso. En sia salutparolo li admiris, ke Esperanto estas granda idealo, granda strebo kaj granda praktiko. Ĝia 100-jara ekzisto kaj disvolviĝo

plene montras ĝian fortan vivipovon. Li opinias, ke Ĉinio, kiel lando kun vasta teritorio kaj granda loĝantaro, devas fari pli da kontribuoj al la mondo.

Donis vervan parolon ankaŭ Chu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Li salutis la kongresanojn en la nomo de vicprezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK kaj prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto". Li diris: "Kiel sincera amiko de Esperanto, mi ĉiam esperas, ke Esperanto estos popularigita kaj uzata en pli kaj pli vasta tereno kaj fine, en ne tre malproksima estonteco, estos ĝenerale agnoskita internacie." Li sentas gran-

Gaja renkontiĝo



Granda ĝojo




komunikistoj, radio-amatoroj, goludantoj, filatelistoj, foto-kino-magnetofono-amatoroj, fervojistoj, medicinistoj, sciencistoj, instruistoj, filozofoj, religiuloj k. a. La nove naskita komitato de UEA elektis sian novan estraron. Faris laborkunvenon ankaŭ diversaj komisionoj de UEA, kiaj tiuj pri literaturo, arto, lingvo, scienca kaj faka aplikado de Esperanto, eksteraj rilatoj, arta premio kaj ekzamena komisiono de la Internacia Esperanto-Instituto. Ĉiu kongresano povis li-

bere partopreni en koncernaj programeroj por interŝanĝi opiniojn kaj akceli nian komunan aferon.


La kongresa temo "interkompreniĝo, paco, evoluo" estas difinita de UEA, laŭ la rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu deklaris la jaron 1986 Internacia Jaro de Paco, kaj laŭ la koncerna decido de Unesko. D-ro Tonkin montris: "Esperanto donas eblecon atingi tiun tutmondan interkompreniĝon, pri kiu aludas nia kongresa

temo. Ĝi estas fundamenta elemento en la paco. Ĝi estas utila ilo en la homa kaj ekonomia evoluo, ĉar ĝi kreas reciprokan respekton inter la popoloj kaj kulturoj, kaj ĝi ebligas senperan komunikadon en spirito de egaleco inter la homoj. En Esperanto neniuj kulturo subpremas alian kulturon, neniuj homoj superas la alian. Ni laboras per tiu Zamenhofa neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu alian."

La Internacia Kongresa Universitato estas unu el la gravaj



La medalo donacita de la Serbia E-Ligo al EPC-redakcio



D-ro Mika J. Andrić donacas medalon al la Ĉina Esperanto-Ligo.

Rigardantoj de kongresaj programeroj surbendigitaj



elementoj de la akademia aktivo. En la Universitato prelegis 10 fakuloj el malsamaj lokoj de nia tero. Malgraŭ ke la temoj de prelegoj estis ne tiel multaj, ili tamen koncernis plurajn fakojn, i. a. pri historio de la tero, ĝia interna strukturo, astronomio, medicino, lingvo k. a. Pro siaj alta akademia valoro, populareco, intereso kaj facila komprenebleco la prelegoj multe plaĉis al la aŭskultantoj.

Se la kongresanoj rigardas diversajn prelegojn kiel perilojn por interŝanĝi sciojn kaj kultu-


rojn, do diversaj teatraĵoj, vesperoj kaj baloj donas al ili ŝancon interkonatiĝi kaj amikiĝi. La kongreso faris diversajn amuzajn aranĝojn, kiaj la ĉina vespero, balo, junulara vespero, teatra, nacia vespero, internacia arta vespero kaj recitalo. En la neforgeseblaj junulara vespero kaj kongresa balo kongresanoj kun malsamaj haŭtkoloroj el malsamaj landoj dancis en gaja melodio.

La kongreso estis tre atentata de la ĉina registaro kaj koncernaj organizoj. Ekzemple, vespere

de la 28-a de julio Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, akceptis la estraron de UEA kaj eminentajn esperantistojn kaj donis al ili bankedon en la Popola Halo. La 1-an de aŭgusto estrarano de la Ĉina Virina Federacio akceptis kongresaninojn kaj transdonis al ili saluton de la ĉinaj virinoj. Krome, Radio Pekino, la Pekina Magistrato kaj la Pekina Esperanto-Asocio aranĝis respektive kunsidojn kaj bankedojn.

Je la deka antaŭtagmeze de la 2-a de aŭgusto pli ol 2 000 kongresanoj ĉeestis la fermon en la Ĉina Teatro. La fermon prezidis Humphrey Tonkin, nove elektita prezidanto de UEA. Flóra Szabó-Felső, la ĝenerala sekretario, faris resumon pri la kongreso.

S-ro Humphrey Tonkin faris paroladon ĉefe pri la tasko de Esperanto-movado en la estonteco. Li diris, ke la konsisto de la kongreso kaj ĝia grandeco montris Esperanto-movadon efektive tutmonda, ke Esperanto havas praktikan valoron kaj estas efika ilo por diverslandaj popoloj koni la mondon kaj fari internacian komunikadon. Li emfazis la instruadon de Esperanto en la estonteco, ĝian praktikan utiligon kaj precipe pli gravan rolon en helpo al la disvolviĝantaj landoj en la sciencoj kaj tekniko. Li diris ankaŭ, ke malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj de alveno tra longaj distancoj, malgraŭ diversaj problemoj surloke, la kongreso "estis entute brila sukceso. Oni tion vidas en ĉiuj aspektoj, la turismaj aranĝoj, la artaj aranĝoj, la programo mem, la helpantoj, la sindediĉo de tiu LKK, kiu escepte multe laboris, entute temas pri unika sperto por ni ĉiuj. Samtempe tiu ĉi



Sur Lijiang-rivero

La nova estraro de UEA sin prezentas.



estis kongreso en evolulando, evoluanta lando, lando kiu lernas en la nuna tempo kiel entute organizi grandajn kongresojn". Li daŭrigis, ke la kongreso plej forte impresis lin per tio, ke la okcidento kaj la oriento komuniĝis, ke la nordo, la industriaj landoj, kaj la sudo, la evoluantaj landoj, interkomuniĝis. "Tiu ĉi kongreso estis ponto, ĝi estis ponto inter kulturoj, ĝi estis ponto inter vivmanieroj, ĝi estis ponto inter la nordo kaj la sudo, la oriento kaj la okcidento. Malvasta eble ankoraŭ estas tiu ponto, malmultaj eble ankoraŭ la esperantistoj, sed tamen tiu ĉi kongreso kreis tiun ĉi ponton, kiun ni sukcesas larĝigi inter la oriento kaj la okcidento, la nordo kaj la sudo, tiel ke entute tiu universaligo, al kiu ni ĉiuj sopiras, efektive ĉi tie en ĉiuj tiuj landoj realiĝu." La prezidanto fine substrekis la jubileon de Esperanto, ke la jubileo de Esperanto estas grava afero en Esperanto-movado. Li apelaciis al ĉiuj esperantistoj kontribui sian tempon, energion, kontribui ankaŭ finance, al tiu tuj venonta periodo, ĉar ĝi estas ege necesa por la estonteco de la Internacia Lingvo.

Ĉe la fermo s-roj G. Maertens kaj Y. Umeda voĉlegis po unu rezolucion. La Rezolucio por Esperantistoj (movada alvoko) emfazis la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fakaj kampoj, kaj reapelaciis al la landaj asocioj digne omaĝi la centjaran jubileon de Esperanto per organizado de apartaj jubileaj kunvenoj, aranĝoj, ekspozicioj kaj aliaj agadoj. La Rezolucio por Eksterstarantoj alvokis al la registaroj, ke surbaze de la Rezolucio Res 23/11.11 de Unesko favore al la centjara jubileo de Esperanto ili



Sur la Granda Muro

donu apogon al la Internacia Lingvo kiel rimedon de internacia intelekta interŝanĝo, precipe por la scienc-teknika progreso de la evolulandoj.

S-ro H. Tonkin deklaris kvin personojn, kiuj faris grandan kontribuon al la Esperanto-movado, kiel honorajn membrojn de UEA. Ili estas Tibor Sekelj, verkisto de Jugoslavio, Yukiko Isobe, prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto, Ye Laishi, aganta prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Catherine L. Schulze, eldonistino de Usono.

S-ro H. Tonkin esprimis sinceran dankon al Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, Huang Hua kaj Chu Tunan, vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, Chen Haosu, vicurbestro de Pekino, kaj ĉiuj membroj de la Honora Komitato de la 71-a UK pro ilia subteno al la kongreso.

D-ro Mika J. Andrić, reprezentanto de la Serbia Esperantista Ligo sub la Jugoslavia Esperanto-Ligo, donacis al UEA, la Ĉina

Esperanto-Ligo kaj la redakcio de "El Popola Ĉinio" po unu specimenon de ora aŭ arĝenta medalo por centjara jubileo de Esperanto.

Chen Yuan, vicprezidanto de la Loka Kongresa Komitato, transdonis la kongresan flagon al s-ro Stanislaw Swistak, prezidanto de LKK de la 72-a UK. La venonta kongreso okazos en la hejmlando de L. L. Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo. S-ro S. Swistak bonvenigis geesperantistojn al Varsovio.

UEA prezentis al ĉiuj LKK-anoj po unu bukedon por esprimi sian dankon pro ilia kontribuo al la sukcesa okazigo de la kongreso.

Fine, s-ro H. Tonkin donis fermajn vortojn. Je duono post la dekdua la kongreso finiĝis triumfe, akompanate de "La Espero" ĥore kantita de la kongresanoj.

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto estis brila kongreso. Ĝi simbolis la alvenon de nova etapo de la internacia Esperanto-movado: uzi Esperanton por paco, progreso, interkompreniĝo kaj evoluo.

SIGNIFAJ PROGRAMEROJ

de ĜANG ĈINGĜEN kaj ŜAŬ BIN

La programeroj de la 71-a UK estis riĉaj, kaj ni povas prezenti al la nekongresanoj nur kelkajn el ili. Ni komencis intervjui la 24-an de julio. Tiutage ni longe parolis kun prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens kaj direktoro de la Centra Oficejo de UEA s-ro Osmo Buller pri la signifo de la 71-a UK kaj la perspektivo de la internacia Esperanto-movado. S-ro Grégoire Maertens havis grandan intereson pri la evoluo de la ĉina Esperanto-movado kaj plenan fidon al la estonteco de UEA. Li

diris, ke la 71-a UK povas ludiron de ponto por interŝanĝo de la orienta kaj okcidenta kulturoj kaj la kongreso mem estas tia interŝanĝo. Liajn vortojn pruvis la programeroj de la kongreso.

POR LA CENTJARA JUBILEO


Kiamaniere festi la centjaran jubileon de Esperanto? Kiam? Kun kiom da partoprenantoj? Nin interesis la demandoj. Ni ĝojis, ke antaŭ la inaŭguro de la 71-a UK ni renkontis la prezidanton de la pola komisiono pri la jubilea jaro s-ro Stanislaw


Swistak en malgranda salono, kie la estraro de UEA akceptis diplomatojn de diversaj landoj. Li, altastatura kaj mezaĝa, staris akompane apud la pola ambasadoro. Ni demandis lin pri la jubileo. Li diris, ke en Pollando oni jam antaŭ unu jaro komencis preparan laboron por festi la centjaran jubileon de Esperanto kaj la 72-an UK partoprenos 6 000 personoj; en Pollando okazos samtempe internaciaj Esperanto-kongresoj kun junulara kaj medicina demandoj kiel la ĉeftemo, kaj la jubilean aktivadon en tiu lando ĉeestos laŭtakse 10 000 personoj. La pola registaro asignis grandan monsumon al la preparado kaj la pola civila aviado ĝuigos al la kongresanoj favoreprezon — 30-procentan rabaton. Oni aranĝas nun ankaŭ ekskursojn kaj artajn programe- rojn.

Samideanoj el TEJO kaj el usona, japana kaj irana Esperanto-organizoj informis, ke por la jubileo iuj landoj nun okazigas Esperanto-kursojn, renkontiĝon de klubanoj, artan prezentadon kaj ekspozicion.

En la kunsido de ĵurnalistoj antaŭ la kongreso ankaŭ la ĝenerala sekretariino de la Unuiĝo Franca por Esperanto rakontis kiel iras la prepara laboro en Francio. Ŝi diris, ke ankaŭ Fran-

S-ro Ye Junjian (la unua de dekstre), rektoro de IKU, kaj kongresanoj





cio aktive laboras por kompili novajn propagandajn kaj instruajn materialojn, ĉijare oni jam kvarfoje aranĝis kulturalan aktivadon, kiel kantado kaj teatra festivalo.

Je la 10-a antaŭtagmeze de la 29-a de julio en la salono Venlo Fon okazis kunveno de la komisiono pri jubilea jaro por diskuti pri preparaj laboroj en diversaj landoj. La kunvenon partoprenis samideanoj el Bulgario, Hungario, Ĉinio kaj aliaj landoj, kiuj donis opiniojn utilajn al propagando de nia lingvo, al kontakto kaj organizado kaj al eldonado de "Esperanto", organo de UEA. La kunveno daŭris unu kaj duonan horojn en etoso tiel varma, ke la ĉeestantoj kiel samfamilianoj diskutis pri grava afero.

POR APLIKI ESPERANTON AL SCIENCO KAJ TEKNIKO

Antaŭ la 71-a UK okazis en Pekino la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tek-

niko en Esperanto kaj akiris grandan sukceson. Tamen ne finiĝis la diskuto de sciencistoj pri scienco en Esperanto.

Dum la kongreso iris kunveno de la komisiono pri scienca kaj faka aplikado de Esperanto, kun partopreno de japanaj, germanaj, iranaj, hungaraj, bulgaraj, usonaj kaj ĉinaj sciencistoj, redaktoroj kaj raportistoj de scienc-teknikaj gazetoj en Esperanto. Nemalmultaj kunvenantoj ne preterlasis la ŝancon sin esprimi. Ili deziris, ke UEA faru pli da laboroj por scienc-teknikaj gazetoj en Esperanto.


Iuj esperis ĉioampleksan gazeton kun fakaj scioj klasifikitaj kaj plendis, ke ili ne povis regule ricevi la scienc-teknikan gazeton de UEA pro ĝia neregula apero kvarfoje ĉiujare. Irana fraŭlino Shirin Ahmad-Nia esperis, ke esperantistaj sciencistoj verkos kaj tradukos popularajn fakajn legaĵojn, kaj diris, ke ŝi nun provas tion.

Iuj kongresanoj rekomendis bonajn scienc-teknikajn gazetojn en Esperanto. La ĉeestantoj esperis, ke UEA donos pli da helpoj al la laboro pri scienco kaj tekniko en Esperanto kaj eldonos pli multajn kaj pli bonajn legaĵojn, por ke Esperanto plene ludu sian rolon.

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

La Internacia Kongresa Universitato de tiu ĉi jaro havis lokon en la salono Zamenhof. Ĝi inaŭguriĝis tie je la dua posttagmeze de la 27-a de julio. Ĉiujfojaj internaciaj kongresaj universitatoj estis bonvenaj al multaj fakuloj el diversaj landoj.

En la nuna universitato prelegis s-ro Jannes Markus Mabe-soone (Brazilo) pri resuma historio de la tero, s-ro E. James Lieberman (Usono) pri psikoterapio, s-ro Bozidar Popović (Jugoslavio) pri popaŝa astronomia solvado de la glaciepoka enigmo, s-ro Chen Yuan (Ĉinio) pri po-



Prof. Helmar Frank, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, konigas la akademion.

polo, lingvo kaj kulturo, s-ro Io Chou (Ĉinio) pri papilioj, s-ro Li Shijun (Ĉinio) pri ĉinaj popolantoj kaj aliaj fakuloj el Japanio, Pollando, Bulgario kaj Nederlando.

La 72-jara fama ĉina verkisto

Ye Junjian funkciis kiel rektoro de tiu ĉi IKU. En la 65-a kaj 70-a UK s-ro Ye faris prelegojn respektive «Nova Ĉina Kulturo» kaj «Hans Andersen en Ĉinio». Li diris al ni, ke venis sume 1600 personoj el pli ol 50 landoj por aŭskulti la prelegojn,

kiuj temas pri sociaj sciencoj, pri la origino kaj evoluo de lingvoj, pri medicino, pri psikoterapio, pri scienco kaj tekniko. Multaj el la prelegoj estis facile kompreneblaj kaj iuj, profundaj, donis multajn sciojn al la aŭskultantoj.

Kunsido de veteranaj esperantistoj



LA ĈINA EKSPRESE

Profunde impresis la 4-hora ĉin-lingva kurso (en du partoj). Ĝin vizitis 80 kongresanoj, kiuj kiel elementlernejoj sekvis la kursgvidantinon Chen Fangfang en voĉlegado. Multaj trovis la ĉinan lingvon malfacila, tamen interesa.

La juna kaj bela gvidantino komencis instrui per la ĉin-lingva fonetika alfabeto kaj poste analizis la strukturon de la ĉina lingvo kaj konigis ĝian ĝeneralan aspekton, kiu havas kvar tonojn. Sama litergrupo kun malsamaj tonoj povas prezenti malsamajn ĉinajn ideogramojn, ekzemple mā (妈 patrino), má (麻 kanabo), mǎ (马 ĉevalo) kaj mà (骂 insulto). La ĉeestantoj estis kontentaj pri ŝia interesa instruado, kiu vekis de tempo al tempo ĉe ili laŭtan ridadon. La gaja kaj amika etoso multe malstreĉis la junan sinjorinon. Ŝi debutis kun iom da timo, sed baldaŭ fariĝis taŭga "instruisto". Antaŭ kelkaj tagoj ŝi ekfosis en materialoj por prepari lecionojn. Ŝi eĉ sonĝis, ke ŝi gvidas ĉinlingvan kurson. Videble, ŝi bone konsciis kaj atentis sian honoran taskon.

Ŝi diligente instruis malgraŭ sia manko de praktiko kaj sperto. Jes, ŝi sukcesis, laŭ multaj ĉeestantoj.

KUNSIDO DE VIRINOJ

Por kontentigi la deziron de kongresaninoj, la Ĉina Virina Federacio okazigis virinan kunsidon je la 1-a de aŭgusto, kiun partoprenis kongresaninoj el 14 landoj.

S-ino Wang Qingshu, membro de la Sekretariato de la Ĉina Virina Federacio, konigis la ĝeneralan situacion de la ĉinaj virinoj, precipe la egalrajtecon de la ĉinaj viroj kaj virinoj. En la kun-

sido iuj kongresaninoj starigis ilin interesantajn demandojn, kiujn la sinjorino respondis. Estis, ekzemple, tiaj demandoj: Kiel oni praktikas naskolimigon en Ĉinio? Ĉu ekzistas en Ĉinio antaŭedziga gravedeco nemaloforta en la mondo? Kiu prizorgas maljunan paron seninfanan? Ĉu estas maljunulejo en Ĉinio? Kiel la ĉinaj maljunuloj pasigas la tempon? Kiom da virinoj estas en la ĉinaj laboristaj sindikatoj? Ĉu edzo aŭ edzino en Ĉinio prizorgas sian infanon? Kiu el ili plenumas la mastrumadon? Ĉu ĉiu ĉina kamparana familio havas multajn gefilojn, ĉar la ĉina kamparo bezonas labormanojn?

Ĉe la fino de la kunsido la federacio donacis al la ĉeestantoj albumojn de verkoj de ĉinaj pentristinoj.

RENKONTIĜO DE VETERANAJ ESPERANTISTOJ

Sub la gvido de s-ino Julie Winter (FR Germanio), sekretario de la Veterana Esperantista Klubo, renkontiĝis samideanoj de maljuna generacio. Tio estis ankaŭ granda renkontiĝo inter ĉinaj kaj alilandaj veteranaj esperantistoj, kun partopreno de pli ol 60 personoj el dek landoj. Parolis multaj el la ĉinaj ĉeestantoj. Diverslandaj gesamideanoj laŭ la kongresa temo substrekis pliigon de interkompreniĝo kaj akcelon de paco. Traktante la demandon de evoluo, iuj metis grandan esperon sur la ĉinan nuntempan reformadon. Tiuj veteranaj esperantistoj, ĝenerale grandaĝaj, montris aktivecon por nia movado, kvazaŭ ili reakirus jenecon en la varma etoso de la kongreso.

Ankaŭ la Pekina Esperanto-Asocio aranĝis similan renkontiĝon. Ĉinaj kaj alilandaj veteranaj esperantistoj babilis gaje kaj

intime. Ili parolis pri sia okupo, sia familio kaj Esp-movado en sia lando. Ili faris komunan fotadon.

La kongreso havigis al blinduloj kaj aliaj handikapuloj okazon renkontiĝi. La renkontiĝon ĉeestis i. a. s-ro Huang Nai, prezidanto de la Ĉina Asocio de Blinduloj kaj Surdmutuloj.

JUNULARA VESPERO

Je la 30-a de julio okazis junulara vespero en la dancejo de la Amikeca Hotelo. Gejunuloj en simplaj, tamen belaj vestoj interparolis du-triope en kaj ekster la dancejo, atendante dancmuzikon. En la unua programero oni petis po unu kongresanon el ĉiuj landoj saluti la ĉeestantojn en sia nacia lingvo. Iu ĉina junulo la unua iris sur la podion. Lin sekvis iu japana knabino laŭpropone. Ŝajne ŝi estis komencanto. La ĉina junulo kaj alia japana junulo, kiu ne staris sur la podio, fariĝis interpretistoj de la knabino kaj la gvidanto de la vespero. Kaj en brua ridado gejunuloj suriris la podion unu post alia. Ili, venintaj el 22 landoj, salutis la ĉeestantojn kaj poste forlasis la podion por aliĝi al la dancantoj.

Inter la gejunuloj troviĝis tiuj, kiuj sciis ankaŭ la ĉinan lingvon. Apud ni sidis germana studentino. Ŝi rakontis, ke ŝi eklernis la ĉinan lingvon antaŭ du jaroj kaj Esperanton nur antaŭ kelkaj monatoj. Ŝi unuafoje vizitis Ĉinion kaj la kongreson. Ŝi amas la ĉinan skriban lingvon kaj legis verkojn de nemalmultaj modernaj ĉinaj verkistoj. Ŝi amas ankaŭ Esperanton pro ĝia facileco kaj komprenebleco.

Eksonis muziko. Plej bele dancis la iranaj knabinoj. La gejunuloj ridis, dancis, rapide amikiĝis. . .

FACETOJ DE LA 71-A UK

de LJAŬ ĜENG

USONAJ ESPERANTISTOJ EN KUNLABORO EN ĈINA SCIENCA ESPLORADO

El la esperantistoj partoprenintaj la 71-an UK estis geedza paro, invitita al Tanggu de Ĉinio por kunlabori en scienca esplorado. Ili estis prof. Ralph A. Lewin de la Scripps-a Oceanografia Instituto sub la Kalifornia Universitato de Usono kaj lia edzino Lanna Cheng, oceanbiologo de la sama instituto. Post la kongreso ili vizitis siajn parencojn kaj amikojn en Pekino kaj Fuĝjan-provinco antaŭ ol reveni hejmen.

Prof. Lewin diris: "Mia edzino estas Fuĝjan-devena singapurano, tial ankaŭ mi povas esti

rigardata kiel duonĉino. Mi amas Ĉinion kaj esperas, ke mi havos ŝancon refoje labori en Ĉinio." S-ino Lanna Cheng parolis la ĉinan lingvon flue. Depost 1980 ŝi trifoje venis al Ĉinio por viziti siajn parencojn. Ŝi diris: "En la lastaj jaroj la vivo de la ĉina popolo multe pliboniĝis. La vestofasonoj modiĝis, novaj domoj konstruiĝis ĉie kaj la manĝaĵoj fariĝis pli delikataj. Tio estas okulfrapa ĉe kamparanoj, kiuj riĉiĝis." Ŝi estis tre ĝoja, ke ŝi povas propraokule vidi tiujn ŝanĝiĝojn en Ĉinio.

PLEJ JUNA KONGRESANO

La plej juna el la kongresanoj estis la 7-jara nederlanda knabo Pilger Michel. Li ne povis pied-

iri pro spina malsano, tial li venis en rulseĝo al la kongreso. Li faris la longan vojaĝon akompanate de siaj gepatroj kaj fratino. Malfeliĉe li estis trafita de lakso en sia unua tago en Pekino. Dank' al la helpo de LKK li ricevis ĝustatempan kuracilon en la hotelo Amikeco. Michel, kvankam malfacila en irado, estis ĉiam gaja. Li povis paroli Esperanton, kio venigis al li multajn ĉinajn kaj alilandajn gesamideanojn por babili kun li dum la kongreso. Antaŭ la kongreso li kaj liaj familianoj vizitis la urbojn Ŝĵian, Nankino kaj Jangĝoŭ, dum la kongreso ili ekskursis al la Granda Muro, la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio kaj aliaj vidindejoj kaj post la kongreso ili pririgardis la urbojn Hangĝoŭ kaj Ŝaŭŝing.

TUJ POST LIA ALVENO

La 25-an de julio la usona samideano Donald Harlow venis al la kongresejo — la Pekina Scienca Halo, tuj post sia atingo de Pekino per trajno. Ekvidinte tie laborantojn de la Libro-servo transportantaj librojn al la kvara etaĝo, li tuj helpis ilin. Li diris: "Mi tre ĝojas, ke mi povas servi al la kongreso."

KORESPONDAMIKOJ EN GAJA RENKONTIĜO

En la komenco de 1986 la usona antropologo R. U. Orloff-

D-ro Ralph A. Lewin kaj oceanbiologo s-ino Lanna Cheng en la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto



Stone starigis korespondan kontakton kun Baŭ Jinhe, juna mongola esperantisto en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio. Baŭ Jinhe deziris studi la ĉinan etnologion. Ili plurfoje interŝanĝis opiniojn pri etnologiaj problemoj. Ĉi-foje en la 71-a UK Orloff-Stone renkontiĝis kun Baŭ Jinhe. Ili estis tre ĝojaj, ke ili povas fari korverŝan interparolon.

Orloff-Stone kaj aliaj usonaj antropologoj opiniis, ke la indianoj en Ameriko originas el aziaj mongoloj, iliaj prapatroj en la malproksima antikveco venis al la norda parto de Nord-Ameriko, tra la Beringa Markolo. Poste ili migradis al diversaj lokoj de la kontinento kaj fariĝis ĝiaj ĉefaj indiĝenoj.

TIO ESTAS POR MI PLEJ ĜOJA

Vespere de la 31-a de julio la fama kanada kantistino Joëlle Rabu okazigis recitalon en la Ĉina Teatro. Antaŭ du monatoj ŝi komencis lerni Esperanton. Ŝi kantis "Rozan Vivon" en Esperanto en la koncerto. Ŝi emocie diris al raportisto: "Mi esperis okazigi recitalon en Ĉinio. Mi unuafoje venis al Ĉinio. Ke mi povas kanti por la ĉina popolo, tio estas por mi plej ĝoja, ĉar Ĉinio estas lando perspektiva, ĝia popolo sopiras al la estonteco kaj laboras diligente, ĉiam kun ridanta vizaĝo radianta de feliĉo."

Ŝiaj kantoj temis pri feliĉo, vivo kaj amo. Kiam spektantoj petis ŝian nomon, ŝi skribis "amo kaj vivo". Sur ŝia ŝminktablo estis komuna foto de ŝi kaj ŝia patro. Ŝi diris: "La patro estas mia plej bona amiko, mi ĉiam kunportas la foton, kiu donas al mi kuraĝon kaj fortunon."

*La filatela tu-
taĵo de la 71-a
UK*



PLI OL 2 000 ESPERANTIS- TOJ EKSURSIS AL LA GRANDA MURO

Matene de la 30-a de julio karavano el pli ol 50 grandaj luksaj aŭtoj rapide veturigis pli ol 1 800 esperantistojn el 52 landoj kaj pli ol 300 ĉinajn esperantistojn al la Granda Muro ĉe Badaling nordokcidente de Pekino.

Tiutage flirtis tie kaj tie verdaj flagoj sur la Granda Muro. La diverslandaj amikoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, ĉiuj senlace supreniris por provi sian forton. Ĉie aŭdiĝis interparoloj en Esperanto. La esperantistoj venintaj el diversaj mondpartoj nesatigeble rigardis la grandiozan, superban pejzaĝon de la Granda Muro. Iuj emocie kantis Esperantan kanton kaj dancis grupe. Filmistoj de televida stacio, fotistoj de EPĈ kaj diverslandaj esperantistoj kaptis tiujn neforgeseblajn scenojn. La vizitantoj laŭdis, ke la Granda Muro tute meritas esti simbolo de la ĉina nacio kaj unu el la mondfamaj antikvaj konstruaĵoj, kaj ke oni bone elektis ĝin kiel emblemon de la 71-a UK. Ili fotis unu alian kun la Granda Muro kiel fono, por ke ankaŭ iliaj parencoj kaj amikoj povu ĝui la belaĵon.

Poste la kongresanoj vizitis la subteran palacon de unu el la 13 maŭzoleoj de Ming-dinastio, kiu

havas historion de pli ol 300 jaroj.

KIEL 23 PAKOJ DA ESP- LIBROJ ESTIS TRANSPOR- TITAJ AL LA KONGRESEJO

La Libroservo de la kongreso vendis ne nur ĉinajn Esperantajn librojn kaj ĉinstilajn metiartaĵojn, sed ankaŭ librojn alportitajn de alilandaj Esperantaj organizoj. Multaj ĉinaj esperantistoj aĉetis alilande eldonitajn librojn, kiujn ili deziris de jaroj. Per tio la Libroservo ricevis laŭdojn de siaj klientoj.

La Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (ILKKĈ) kaj ĝia Esperanta sekcio faris multajn laborojn tiurilate, kion la klientoj ne sciis.

Jam en la aŭtuno de 1985 UEA komisiis al ILKKĈ la libroservon de la 71-a UK. En la fino de marto ĉi-jare UEA ekspedis per ŝipo 23 pakojn da Esp-libroj al Ŝingang-haveno de Tjanĝin kaj poste trajne al Pekino. En la komenco de julio ILKKĈ sendis laboranton al Ŝingang-haveno por preni la ekspedaĵon, sed ĉi tiu informiĝis, ke la ŝipo alvenis al Ŝanhajo, atendante endokiĝon, kaj atingos Tjanĝin en la komenco de aŭgusto. Konsiderante ke preni la varojn en Tjanĝin certe fuŝos la aferon, ILKKĈ telefone informis sian agentejon

en Ŝanhajo en la 17-a de julio, ke ĝi elŝipigu la varojn anticipe. Sed tiutempe ILKKĈ kaj ĝia agentejo en Ŝanhajo ne havis ŝarĝateston, kaj krome, la ŝipo ankriĝis surmare kaj ankoraŭ ne malŝarĝiĝis. La agentejo multe klopodis kaj fine ricevis favoran permeson de la ŝipestro, ke oni formovu per argano grandajn kargojn por elpreni la 23 pakojn de sur la holda fundo kaj transportu ilin per barĝo al la bordo. Ankaŭ la doganejo kaj la civila aviada kompanio donis apartan favoron. Dank' al tio la pakoj estis aviadile transportitaj al Pekino en la 22-a de julio.

NASKIĜTAGA FESTADO EN LA PITORESKA URBO GUJLIN

La 4-an de aŭgusto la novzelandla esperantistino E. Lymburn hazarde diris dum sia vizito de la fama ĉina pitoreskejo Gujlin, ke tiu tago estas la 83-a datreveno de ŝia naskiĝtago. Aŭdintion, gesamideanoj gratulis ŝin, ke ŝi havis ŝancon partopreni la 71-an UK, admiris ŝian sanon kaj interkonsentis festi ŝian naskiĝtagon. La informo rapide disvastiĝis kaj atingis laborantojn de la Ĉina Internacia Turisma Servo. Por esprimi gratulon al s-ino E. Lymburn, la laborantoj preparis apartan festotorton kaj okazigis festkunvenon. En la kunveno oni havis malfacilon: Kiom da kandeloj oni starigu sur la torto, kiam oni ne povis stariĝi 83 kandelojn? Kion fari? S-ino E. Lymburn diris, ke sufiĉas ok kandeloj, el kiuj ĉiu reprezentas dek jarojn. Iu usona geedza paro kun sia infano la unua ekkantis festkanton kaj la aliaj ĥore sekvis ilin, kio kreis varman atmosferon. Kvankam s-ino E. Lymburn multfoje festis sian naskiĝtagon, sed la ĉi-foja

festado multe diferencis de la pasintaj. Ĝi estis simpla, tamen ĝin partoprenis gastoj el multaj landoj, kiuj kore deziris al ŝi ĝojon, sanon kaj longan vivon.

LA FILATELA TUTAĜO DE LA 71-A UK

Okaze de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis filatelan tutaĝon, projektitan de la juna desegnistino Ren Yu. La poŝtmarka bildo sur la tutaĝo estas verda-floro en formo de kvinpinta stelo kun tri multkoloraj folioj. En la centro de la floro flugas blanka kolombo el la literoj "UK". La tri multkoloraj folioj aspektas kiel la cifero "71" kaj sugestas diversajn naciojn kaj naciajn lingvojn. Ĉe la malsupra angulo maldekstre de la tutaĝo estas la ovala emblemo de la 71-a UK, ĉirkaŭ kiu flugas sep kolomboj. La tuta bildo montras la vivecon de Esperanto, la prosperon de ĝia movado kaj la amon de diverslandaj esperantistoj al paco.

"MALNOVAJ AMIKOJ" EN LA UNUA RENKONTIĜO

En la koridoro de la Scienca Halo iu ĉina junulino sidis senmove en seĝo. Kontraŭ ŝi sidis jugoslava esperantisto Hunor Gyurkovics, kiu jen levis, jen mallevis la kapon por desegni surpapere. Li, pentristo, estis absorbata en farado de portreto por la junulino.

La junulino nomiĝas Liŭ Ŝjaŭgŭang, 23-jara instruistino de la Ĉangcun-a Financ-administra Instituto sub la Ĉina Industria kaj Komerca Banko. Ŝi komencis lerni Esperanton antaŭ unu kaj duona jaroj. Foje ŝi aperigis sian anonceton en la organo de ĈEL "La Mondo" por serĉi ĉinajn kaj

alilandajn korespondamikojn. Leginte la anonceton, s-ro H. Gyurkovics skribis al ŝi leteron. Tiel ili komencis korespondi kaj fariĝis bonaj amikoj. Ĉifoje ili sukcesis renkontiĝi en la kongreso.

BLINDULOJ BRAVAJ KAJ MEMFIDAJ

El la kongresanoj estis tri blinduloj, kiuj vekis la atenton de multaj kongresanoj. Ili estis s-ro P. Smith, tajpisto de iu usona hospitalo, s-ro Ŝju Bajlun, pli-ol-60-jara ĉino, kiu redaktas la unuan ĉinan gazeton por blindaj infanoj "Literaturo de Ĉinaj Blindaj Infanoj", kaj la 23-jara Ŭang Ĵen, kiu loĝas en Pekino.

La tri blindaj esperantistoj renkontiĝis kaj interparolis en la koridoro ĉe la salono Zamenhof. "Kiujn signifajn laborojn vi faris por blindaj infanoj?" demandis s-ro P. Smith. S-ro Ŝju diris: "Eble pro mia blindeco mi pli bone konas la suferon de blinduloj kaj volonte laboras por blindaj infanoj. Preskaŭ ĉiuj infanaj aktivadoj en Ĉinio estas aranĝitaj por sanaj infanoj, kaj blindaj infanoj havas malmulte da ŝancoj. Tial ni aranĝis aktivadojn por blindaj infanoj, por ke ili estu gajaj kaj feliĉaj kiel sanaj infanoj. La 14-an de julio ĉi-jare la tutlanda somera tendaro por blindaj infanoj estis aranĝita unuafoje en Ĉinio. La infanoj en ĝi agrable amuziĝis. Ili vizitis historiajn restaĵojn, ĝuis belan muzikon, ludis kun sanaj infanoj ktp."

Same kiel s-roj Smith kaj Ŝju, ankaŭ Ŭang Ĵen estas brava kaj memfida. Sep monatojn post sia naskiĝo li perdis la vidkapablon. Dank' al sia diligenta memlernado li fariĝis talentulo. Baldaŭ li vojaĝos al Usono por



Ŝaŝa Bajni (maldekstre) kaj japana veterana esperantistino



S-ino Ellen Eggers (la kvara de dekstre) kaj s-ro Hans Schütt (la unua de dekstre)

lerni pedagogion kaj ekonomian administradon.

ŜI NASKIĜIS EN ĈINIO

S-ino Ellen Eggers portis ĵus aĉetitan ĉinan kolieron el klozoneaj bidoj. Ŝi estas altstatura, svelta, afabla kaj ridema. Neniu kredus, ke ŝi estas jam 80-jara, se ŝi ne havus blankan hararon.

Ŝi longe vivas en Hamburg, tamen ŝi naskiĝis en Ĉingdaŭ de Ĉinio apud la Flava Maro. Ŝi kreskis sub flegado de ĉina nutristino kaj forlasis la urbon 15-jara. Ŝia patro estis fondinto de la Ĉingdaŭ-a Bier-farejo, kiu iam gajnis internacian oran medalon.

Antaŭ kelkaj jaroj s-ino Ellen Eggers revenis al Ĉingdaŭ. Ŝi diris: "Hodiaŭ Ĉingdaŭ fariĝis pli bela. Post longa tempo mi ne povas tuj rekoni ĝin. Sed la loĝantoj, kiujn mi vidis, kaj la dialekto, kiun mi aŭdis, tuj rememorigis min pri la malproksima epoko." Ŝi recitis interesan ĉinan infankanton, kiu vekis ridon de la ĉeestantoj.

BAJ-AJ PATRINO KAJ FILINO EN LA KONGRESO

Ŝaŝa Bajni, vigla kaj aminda ok-jara baj-a knabino el Junnan-provinco, estis la plej juna ĉina kongresano. Ŝi kaj ŝia patrino Ŝaĝjang Bajni kune venis al Pekino por partopreni la kongreson.

Ŝaĝjang Bajni estas dramistino-reĝisorino de la Nacimalplimulta Dramaturgia Societo en Junnan-provinco kaj ĉefredaktoro de la gazeto "Kosmo" eldonata de la Esperanta Naci-arta Asocio. Ŝi lernis Esperanton jam dek jarojn. Ŝaŝa eklernis de la patrino Esperanton en sia aĝo de 5 jaroj. Nun ŝi povas voĉlegi en Esperanto mallongajn kaj facilajn artikolojn kaj poemojn. Ŝi lernas en la dua klaso de elementa lernejo. Ŝi amas muzikon, kaligrafion kaj fotografion. Antaŭ ne longe ŝi estis invitita de la redakcio de la infana gazeto en Ŝanhajo "Malgranda Mastro" kiel raportisteto. Dum ĉi kongreso ŝi ĉeestis kiel malgranda reprezentanto Esperantan scienc-

teknikan kunvenon kaj voĉlegis "Mi Amas Pagodojn" el siaj literaturaj notoj.

"ANKAŬ MI LERNOS ESPERANTON POST MIA HEJMENREVENO"

Iutage membro de la Mitsubishi-a Piedpilka Teamo de Japanio, kiu venis al Ĉinio por partopreni la Internacian Piedpilkon Konkurson de Pokalo "Granda Muro", iris al la Metiartaĵa Magazeno ĉe la strato Ŭangfuĝing de Pekino. Ĵus aĉetinte metiartaĵon, li volis plian. Sed la komizo, kiu parolas nur la ĉinan kaj anglan lingvojn, tute ne komprenis liajn gestojn. Ili ambaŭ ĉagreniĝis pro tio.

Ĝuste tiam kelkaj japanaj kongresanoj venis al la stando. Informiĝinte pri la deziro de la sportisto, ili tuj diris tion al sia ĉina akompanantino, kiu interpretis por la komizo. La japana piedpilkisto sukcesis aĉeti la metiartaĵon. Li ĝoje diris: "Esperanto estas vere bona, ankaŭ mi lernos Esperanton post mia hejmenreveno."

ĈINAJ ESPERANTISTOJ EN UK

de MEJ ĜI

LI NE ESTAS KONGRESANO, SED VENIS

23-jara U Ŭejgŭang naskiĝis en Ĝangĝang, Gŭangdong-provinco. Li ne estas kongresano, sed venis al la kongreso. Li diris, ke li venis por rigardi, kiel statas UK. Li diris al mi, ke li antaŭe lernis la anglan lingvon, poste lia patro devigis lin lerni Esperanton, kion tamen malaprobis lia amikino. Fine ŝi forlasis lin. La patro donis por li la tutan elspezon por lernado. Kiam li volis ĉesigi la lernadon de Esperanto, lia patro eĉ vangfrapis lin. Poste li eklernis Esperanton en la Anhuj-a Esperanto-Kolegio. Tiam lia patro suferis de grava malsano, kion oni tamen ne scii-

gis al li. Antaŭ sia morto lia patro testamentis, ke li bone lernu Esperanton. Li komprenis la koron de sia patro kaj decidis neniam forlasi Esperanton. Pro limigo de la kondiĉoj li ne anoncis sin al la kongreso. Sed lin tiklis la kongreso kaj li venis al Pekino por UK.

En la antaŭtago de la inaŭguro, li frumatene venis en la kongresejon de la Pekina Scienca Halo. Jen li interparolis kun iu, jen kun alia. La korverŝa interparolado ofte ekscitis lin. Oni sciis de lia parolo, ke li jam korespondis unu jaron kun jugoslava esperantisto. Ĉifoje li volis vidi sian korespondan amikon kaj aĉeti librojn por starigi mal-

grandan bibliotekon por la Ĝangĝang-a Esperanto-Asocio. Estas tre bedaŭrinde, ke li ne sukcesis partopreni la inaŭguron de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto.

En la kongreso estis 340 ĉinaj kongresanoj kaj 140 ĉinaj helpantoj. Pro tio Ĉinio havas la plej multajn ĉeestantojn de la kongreso. Nun en Ĉinio estas 148 diversaj esperantaj asocioj. Depost 1979 pli ol 3 000 studentoj en diversaj altlernejoj eklernis Esperanton kiel fakultativan lernobjekton, pli ol 400 000 homoj vizitis diversajn korespondajn esperantajn lernejojn kaj kursojn. Kompare kun tio la ĉinaj ĉeestantoj ĉe la kongreso estas malmultaj. Tial la 340 ĉinaj kongresanoj vere estas "reprezentantoj" de la ĉinaj esperantistoj.

Ĉinaj esperantistoj kaj alilanda esperantistineto



TRI ĈINAJ FAKULOJ

La 27-an de julio malfermiĝis la Internacia Kongresa Universitato. Ye Junjian (Chun-Chan Yeh), vicprezidanto de LKK, rektoro de la universitato, fama ĉina verkisto kaj tradukisto, faris paroladon kun titolo "Scioj por paco kaj disvolvo". Li konigis la disvolvon de la homa civilizacio kaj montris, ke internaciaj reciprokaj kompreno kaj amikeco, internaciaj reciprokaj konfido kaj kunlaboro estas funda-

mentaj faktoroj por akceli mondpacon kaj idealo de d-ro Zamenhof en iniciato de Esperanto. Fakte la Internacia Kongresa Universitato ja stariĝis kaj disvolviĝis sur tiu bazo.

En la ĉi-foja IKU tri ĉinoj faris prelegojn. Ili konigis de diversaj flankoj la antikvajn kulturojn de Ĉinio al la ĉeestantoj, kio tre interesis la aŭskultantojn. Vicprezidanto de LKK s-ro Chen Yuan estas lingvisto. Li faris prelegon kun temo "Popolo, lingvo kaj kulturo" kaj priparolis sian vidpunkton prenante la ĉinajn ideografiaĵojn kiel bazon. Kvankam la ĉinaj ideografiaĵoj estas fremdaj al la eksterlandanoj, tamen ili allogis al si aŭskultantojn dank' al la diapozitivoj kaj humura prelegado.

Io Chou, ĉina profesoro de entomologio, faris prelegon "Papilioj venas". Li, pli-ol-70-jara, estas vigla kaj parolema. Li ĝoje diris al mi, ke li faris prelegon kun temo "Ĉinio marŝas en insekta mondo" en la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en 1982. La ĉi-foja prelego estas la frukto de lia esploro dum la tuta vivo kaj nun jam aperis libroforme. Literatura

S-ro Chen Yuan prelegas pri popolo, lingvo kaj kulturo.



libro "Papilioj venas" konigis multajn belajn ĉinajn legendojn pri papilioj.

La tria ĉina fakulo estas Li Shijun, membro de la Akademio de Esperanto kaj vicĉefredaktoro de la redakcio de "El Popola Ĉinio". Li faris prelegon kun titolo "Enkonduko al studo pri ĉinaj popolkantoj", kiu ĉefe konigis abundecon, buntecon, klasifikon, kolektan laboron kaj artan valoron de la ĉinaj popolkantoj. Apenaŭ finiĝis lia prelego, oni tuj ĉirkaŭis lin por gratuli lian sukceson kaj esprimi sian grandegan intereson pri la


ĉinaj popolkantoj. Iuj donacis al li sian kaseton pri sianaciaj popolkantoj, aliaj volis akiri de li kaseton pri la ĉinaj popolkantoj.


MAJSTRO KONTRAŬ EKSPERTO

Informiĝinte ke la Esperantista Go-Ligo Internacia okazigos konkurson, mi rapidis al la konkursejo. La ludistoj jam estis pretaj. En la ludo neniuj cedis al la rivalo. Estas viglaj ankaŭ la rigardantoj. La ludado estis bona ŝanco por interŝanĝi spertojn. Tial kvankam oni estis en streĉa ludado, tamen la atmosfero estis harmonia.

En la konkurso partoprenis ĉinaj vejĉi[go]istoj Zhang Hongfan, Song Zibin, Mei Luo, Tang Xunan, Wang Yan-jing, Zhang Yongle kaj Liu Xiaoping. Zhang Hongfan, membro de la konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, ludis vejĉion kun iu usonano. Kvankam la ludo evidente favoris al Zhang, la usonano tamen restis aplomba kun plena memfido ŝanĝi la situacion. Fine pro malfacila rompo la usonano estis venkita. Poste Zhang diris al mi, ke li tre ŝatas vejĉion, legis

Vejĉi-ludo





Korpo-ekzercado per Tajĝiĉjŭan

librojn pri vejĉio. En la pasinteco li okazigis “Vejĉian Kurson” en EPĈ, kiam li laboris en la redakcio de EPĈ. Pro okupiteco li tre malmulte ludis vejĉion. Li ne atendis, ke li hodiaŭ havas ŝancon interŝanĝi ludarton pri vejĉio kun samideanoj. Pro tio li estis tre ĝoja. Zhang nun estas respondeculo de la prepara grupo de la Ĉina Esperantista Vejĉio-Ligo.

En la konkursejo viglis ankaŭ juna vejĉiisto nomata Song Zibin. Li estas unika ĉina membro de la Esperantista Go-Ligo Internacia kaj unu el la respondeculoj de la prepara grupo de la Ĉina Esperantista Vejĉio-Ligo. Jen japana vejĉiisto, rivalo de Song, sentis minacon de perdo. Rigardinte sian rivalon li skuis la kapon kaj laŭdis kun rideto la junulon kaj vole-nevole konfesis sian malvenkon. La japano kaj Song amikece interŝanĝis

korespondajn adresojn. Nuntempe Song Zibin klopodas por starigi la Ĉinan Esperantistan Vejĉio-Ligon. Laŭ li Esperanto estas efika instrumento por disvastigi ĉinan vejĉion al la tuta mondo.

TAJĜIĈJŬAN-KURSO

La somera frumateno estas la plej bela. Oni frue ellitiĝas kaj kolektiĝas en korto de la hotelo Amikeco por pli multa ĝuo. Ilia deziro realiĝis. Ili lernis Tajĝiĉjŭan de instruisto Liu Ling.

LKK antaŭlonge faris decidon okazigi Tajĝiĉjŭan-kurson kaj Liu estis elektita kiel instruisto de la kurso. Liu komencis ekzerci sin per Tajĝiĉjŭan en la kvindekaj jaroj. Li lernis de majstro de Tajĝiĉjŭan kaj poste li peneme ekzercis sin per simpligita Tajĝiĉjŭan.

En la unua mateno la kurson ĉeestis pli ol 100 personoj. Liu malkaŝe diris al ĉiuj ĉeestantoj, ke Tajĝiĉjŭan ne estas ellernebla en kelkaj tagoj, kio tamen ne malpliigis ilian intereson. Liu serioze instruis pri ĉiu movo, dum la kursanoj serioze lin imititis. Tiel ses tagoj pasis. La nombro de la kursanoj iam eĉ atingis ĉ. 100 kaj neniam malsuperis 50-60. Kvankam la kurso estis mallonga, tamen la frukto ne malbona. Multaj kursanoj esprimis ke post reveno al la hejmloko ili daŭros lerni Tajĝiĉjŭan por la sano. Ili unu post alia venis al la libroservo por aĉeti la libron “Tajĝiĉjŭan”. Pro tio 250 ekzempleroj de “Tajĝiĉjŭan” estis rapide elĉerpitaj.

Liu diris, ke li iam instruis Tajĝiĉjŭan al japanaj samideanoj, kio amikigis ilin. Nun li propagandis Tajĝiĉjŭan per Esperanto kun la sama celo de reciproka kompreno kaj amikeco.

KIEL ILIN IMPRESIS LA 71-A UK EN ĈINIO?

de LIU CAISHENG

Dum la kongresaj tagoj mi interparolis kun pluraj alilandaj esperantistoj. Iuj el ili unuafoje vizitis Ĉinion kaj aliaj jam plurfoje. Jen kiel ili opiniis pri la 71-a UK kaj kiel impresis ilin la vojaĝo en Ĉinio.

ĜOJO KAJ TIMO

66-jara franca sinjoro Maurice Sujet diris: "La 71-an UK mi atendis kelkajn jarojn. Mi pensas, ke multaj en la mondo atendis tiun ĉi kongreson." La pekina kongreso ĝojigis ankaŭ s-inon Flóra Szabó-Felső, ĝeneralan sekretarion de UEA. "Kiam mi informiĝis, ke oni okazigos la 71-an UK en Pekino, mi estis entuziasma kaj samtempe iom timema. Mi kredis, ke la ĉinaj esperantistoj estas tre kapablaj kaj la organiziteco de la lando permesas okazigi tiun grandan manifestacion en Ĉinio. Sed samtempe ni devas konsideri la grandan distancon inter Eŭropo, niaj ĝeneralaj kongresanoj, kaj Ĉinio. Mi timis precipe pri la restadkaj flugkostoj," diris Flóra Szabó-Felső. Fakte la esperantistoj venis al Ĉinio, la kongreslando, el Eŭropo, Ameriko, Aŭstralio, Afriko kaj aliaj partoj de Azio, malgraŭ la longa vojo de miloj da kilometroj. "La alta cifero de partoprenantoj jam pruvis, ke estas granda intereso en la mondo pri Ĉinio kaj la ĉina Esp-

movado. Oni atendis multajn de la pekina kongreso," tiel diris la ĝenerala sekretario.

LA VIDKAMPOJ LARGĜIGITAJ

La kongresanoj estis profunde impresitaj de la kongresaj programeroj. En la kvara tago de la kongreso jugoslava verkisto Tibor Sekelj diris: "La frukto de la kongreso estas tre grava, ĉar ni staras antaŭ la cent-jariĝo de Esperanto. Do multaj gravaj

decidoj estas farataj por ke la venonta jaro estu brila signo de tiu grava evento. Mi kredas, ke tiu ĉi kongreso grandskale kontribuas al la sukceso. Kvankam tiu kongreso dum unu semajno estas tre mallonga, tamen mi estas kontenta, ke multaj personoj venis ĉi tien dank' al Esperanto." Li diris, ke "La organizo de la kongreso estis bone preparita. Oni dediĉis grandan atenton al ĉiu detalo kaj vere mi povas havi nur la dankon." Flóra Szabó-

Nov-Zelanda s-ano kaj la aŭtoro (la unua de dekstre)



Felsö estis interesita de la programo de la kongreso. Ŝi diris: "Precipe la artaj aranĝoj estas altkvalitaj." La nacia vespero tre larĝigis la vidkampojn de multaj kongresanoj. S-ro Sekelj estis forte impresita ankaŭ de la bona rilato inter la ĉina esperantistaro kaj la registaro kaj ŝtata gvidantaro. Li diris: "Tio estas tre kuraĝiga afero kaj povas esti bona ekzemplo kaj modelo por multaj landoj." "La ĉina registaro alte taksas Esperanton, kio ne estas mirinda. Ĉinio estas lando, kiu havas tre longan kaj interesan historion kaj grandajn spertojn historiajn, kiujn ĝi povas transdoni kaj deziras transdoni al la mondo. Ĝi prizorgas la mondon kaj ne povas fari tion en la ĉina lingvo, sed ankaŭ ne deziras fari en iu alia lingvo. Tial nature ĝi elektu Esperanton kiel vojon por diskonigi siajn jarmilajn spertojn en politiko, en homaj rilatoj kaj ĉio alia."

La kongreso amikigis la ĉinajn kaj alilandajn esperantistojn. Ĝi donis al la kongresanoj de diversaj landoj la okazon koni la ĉinan Esp-movadon kaj Ĉinion. Oni ĝenerale estas kontentaj pri la kongreso.

Franca sinjoro Maurice Sujet diris: "En la kongreso oni multe diskutis pri la kongresa temo 'interkompreniĝo, paco, evoluo'. Sed pli grava estas la vera kontakto de la samideanoj de ĉiuj partoj de la mondo. . . Oni interkomprenis ne nur per vortoj, sed, eble ĉefe per faktoj." Belga fraŭlino Barbara Poterucha diris: "Oni interŝanĝas la opiniojn kaj komuniĝas inter si ne nur per vortoj, sed ĉefe per la koro."

ŜANĜIĜO DE LA ĈINA ESP-MOVADO

Koncerne la ĉinan Esp-movadon, multaj kongresanoj, precipe tiuj, kiuj antaŭe vizitis Ĉinion kaj konatiĝis kun la ĉina Esp-

movado, estis forte impresitaj de ĝia granda progreso en la lastaj jaroj. S-ino Flóra Szabó-Felsö vizitis Ĉinion en 1981 kaj renkontis nemalmultajn ĉinajn esperantistojn. Ŝi sentis, ke tiam "ĉinaj esperantistoj estas pli fermitaj. Kaj nun pli amikaj, pli malfermaj, pli komprenemaj al niaj problemoj kaj ni ankaŭ estas pli komprenemaj al problemoj de la ĉina Esp-movado, ĉar tio estas interkompreniĝo finfine. Kaj mi dirus iom tiatempe antaŭ pluraj jaroj. Mi renkontis iom da esperantistoj kiuj bone parolis, sed tiatempe la granda plimulto estis, mi dirus, komencantoj, kun malalta lingvonivelo."

Japana samideanino Yukiko Isobe "vidis nur en kelkaj jaroj grandegan diferencon en la nombro kaj ankaŭ kvalito de esperantistoj en Ĉinio". Ŝi diris: "Mi ĉiam trovas diferencajn okazojn pri Esp-movado en Ĉinio kun miro kaj admiro, ĉar fakte antaŭ 12 jaroj mi vizitis Pekinon kaj Ŝanhajon, tiam nur tre malgranda nombro da esperantistoj laboris, tamen nun, precipe dum la lastaj jaroj, Esp-movado en Ĉinio estas vere laŭdinda, ĉar preskaŭ en ĉiuj ĉefaj urboj troviĝas Esp-organizaĵoj kaj tiel multaj ĉinoj lernas Esperanton."

"MI VIDIS PROGRESON"

La ŝanĝiĝo de Ĉinio en tiuj jaroj forte impresis la alilandajn esperantistojn. Tibor Sekelj diris: "Mia impresio pri Pekino estas treege bona. Mi estis ĉi tie lastfoje antaŭ 5 jaroj. Mi vidis grandegan progreson. Unue oni vidas kompreneble la stratojn, la konstruaĵojn kaj mi estis surprizita de la diferenco inter la antaŭa vizito kaj la nuna, sed la plej grandan diferencon oni vidas ĉe la homoj. La homoj as-

S-ro Maurice Sujet (la tria de maldekstre) kaj aliaj esperantistoj en ĉina kamparo



pektas pli freŝaj, pli kontentaj kaj ankaŭ mi parolis kun kelkaj ordinaraj homoj kaj mi trovis, ke la pensmaniero ŝanĝiĝis en tiu mallonga tempo de 5 jaroj. Mi estas vere kontenta kaj mi estas certa, ke tiu progreso daŭros kaj iros antaŭen ĉiam.”

Franca samideano Maurice Sujet vizitis Ĉinion en 1982. Li trovis eksterordinaran ŝanĝiĝon en tiuj 4 jaroj. Li diris: “Ŝajnas al mi, ke tio okazis ne en 4 jaroj, sed en 40 jaroj. Mi vidis, ke Ĉinio vere malfermis sian pordon al aliaj landoj.”

“SE NE ESTUS ALIES HELPO. . .”

Bone impresis la kongresanojn ankaŭ la naciaj kutimoj, ĉinaj moroj. Ĝenerale esperantistoj estas inklinaj al humanismo kaj helpemo. Emocie diris franca samideano blindulino Reynalde Poncet: “La homoj estas ĉiam afablaj, helpemaj, zorgemaj kaj ni devas dankegi ilin.” Ŝi diris plue: “Ĉiam ni renkontas homojn, kiuj helpas nin. Kompreneble se neniu helpus nin, ni ne povus fari ion. Sed fakte oni ĉiam klarigas al ni la vidaĵojn. Ni havas iom da impresoj pri la kongreso kaj la belaj pejzaĝoj de Ĉinio, ne kompletaj, kompreneble. Ni dankas ilin.” Kaj ŝi kaj ŝia amiko ambaŭ ripetfoje diris al mi: “Ni devas multe danki la ĉinajn kaj alilandajn samideanojn, kiuj multe helpas nin, zorgas pri ni. Se vi verkas artikolon, nepre diru tion.”

Finnlanda sinjoro Pentti Jarvinen skribis al la redakcio de EPC kun peto aperigi en ĝi sian dankesprimon: “La finnlanda kongresgrupo volas kore danki al ĉiuj ĉinaj esperantistoj (kaj pere de ili ankaŭ al pluraj ne-esperan-



S-ro Osmo Buller (meze) kaj f-ino Barbara Poterucha en turisma loko

tistoj), kiuj per sia sindona laborado ebligis al ni sperti ĝuoplenajn kaj neforgeseblajn tagojn dum ĝia restado en Ĉinio, tiel dum la kongresa semajno, kiel ankaŭ dum la ekskursoj AE3 kaj PE6.”

“MI POVAS NUR ADMIRI. . .”

Antaŭ kaj post la kongreso grandnombraj kongresanoj vojaĝis al iuj pitoreskaj lokoj. La belaj pejzaĝoj kaj antikvaj konstruaĵoj forte impresis ilin. Mi volas doni ekzemplon nur per unu malgranda okazaĵo: Vojaĝante surŝipe sur Lijiang-rivero, oni estis tute ravitaj de la feaj pejzaĝoj. Ĉe la vojaĝmezo oni plurfoje petis la turistojn tagmanĝi, kiam la manĝaĵoj jam estis surtablitaj, tamen pluraj ne volas altabliĝi, dirante: “Ni ne volas manĝi la frandaĵojn, ni volas manĝi la pejzaĝojn.” “Se mi

manĝos, do mi perdos la bonegajn ŝancojn ĝui la ĉarman pejzaĝon.” Iu kanada sinjoro diris: “Mi vojaĝis en multaj landoj, sed neniam vidis tiajn majestajn kaj belegajn kreaĵojn. Vere ravaj! Antaŭ la paradizeskaj pejzaĝoj mi povas nur admiri, ne volante perdi eĉ unu sekundon.”

Kompreneble pro diversaj kaŭzoj, en la kongreso estis ankaŭ iuj mankoj. Ekz. ne ĉiuj ricevis kongresan insignon kaj kongresajn dokumentojn en la unua tago de la kongreso. Pluraj plendis, ke la hotelo estas tro malproksima de la kongresejo kaj oni devigite perdis karajn horojn survoje. Iu 13-jara nederlanda knabino diris, ke la organiza laboro de la kongreso ne estis tiel bona, kaj oni iam simple ne sciis kion fari. Malgraŭ ĉio ĉi, plejparto de la kongresanoj persistas, ke la 71-a UK estas ĝojiga kaj neforgesebla.

KURAĜIGO KAJ ESPERO

— Pri la kunsido de EPC-legantoj

de CAŬ BAJLONG

La 31-an de julio la redakcio de El Popola Ĉinio okazigis en Zamenhof-salono la plej grandan kunsidon de legantoj post sia fondiĝo. Ĝin ĉeestis pli ol 300 legantoj laŭ invito.

La kunsidon prezidis Li Shijun, vicĉefredaktoro de la redakcio de El Popola Ĉinio. Ĝin ĉeestis Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, Xu Shanshu, vicedirektoro de la redakcio kaj Yang Rumo, ĝia vicĉefredaktoro.

Por ĉeesti la kunsidon iuj forlasis ŝancon viziti Bejhaj-parkon kaj la Ĉielan Altaron, filatelaj amatoroj la aktivadon okazigitan

de la Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj, aliaj ŝanĝis sian decidon partopreni en la samtempe okazigata aktivado de UN aŭ tiu de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

En la kunsido gastoj kaj gastigantoj renkontiĝis kiel malnovaj amikoj, libere interparolis kaj interŝanĝis opiniojn. D-ro József Kondor de FR Germanio, malnova leganto de El Popola Ĉinio de pli ol 30 jaroj, faris entuziasman paroladon, kiu montris dezirojn de multaj ĉeestantoj. Li diris: "Mi legis tiom multe en El Popola Ĉinio kaj vi-

dis tiom belajn fotojn pri diversaj pejzaĝoj kaj famaj konstruaĵoj de Ĉinio, kaj mi nun havas eblon mem viziti Ĉinion. Mi ĝojas, ke mi povas propraokule vidi ĉion, kion mi legis en EPC kaj kion mi vidis en bildoj de la gazeto."

La parolado de s-ino Emilija Lapena, malnova amiko de El Popola Ĉinio, multe kuraĝigis nin. Ŝi diris: "Mi 33 jarojn aktive kunlaboras kun Radio Zagrebo en Esp-elsendo, kaj en la lastaj jaroj, eble dek, eble pli, eble iom malpli, konstante mi recenzas la revuon El Popola Ĉinio. La ĉina revuo El Popola



Antaŭ la kunsido

Interkompreniĝo, paco, evoluo

— Pri la 71-a UK en Pekino

de EPC-raportistoj




En la Ĉina Teatro okazis la inaŭguro de la 71-a UK.



La kongresejo





S-ro Huang Hua, prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK, salutas la inaŭguron.



S-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA, parolas ĉe la inaŭguro.

Kongresanoj




D-ro Humphrey Tonkin, nova prezidanto de UEA, parolas ĉe la fermo.

VERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



La inaŭguro

Kongresa bankedo






Huang Hua (la kvina de dekstre) intervidiĝas kun la estraro de UEA.



S-ro Chu Tunan, vicprezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK, intervidiĝas kun d-ino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA.

S-ro Ye Laishi, aganta prezidanto de ĈEL kaj prezidanto de LKK, manpremas s-ron Simo Milojević.

S-ro Chen Haosu, vicurbestro de Pekino kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, intervidiĝas kun estraranoj de UEA s-ro Petâr Todorov (la unua de dekstre) kaj s-ino Barbara Despinea (la dua de dekstre).






*S-ro Yosimi Ume-
da, vicprezidanto
de UEA, parolas
en la kongreso.*



*Kunveno de la
Komitato de UEA*



S-ro Chen Yuan, vicprezidanto de LKK de la 71-a UK, transdonas la kongresan flagon al s-ro Stanislaw Swistak, prezidanto de LKK de la 72-a UK.





Subskribado por paco aranĝita de japanaj esperantistoj





Prelego pri la kongresa temo

*Prof. Sin'itirô Kawamura prelegas pri nutra bioke-
mio.*



En la nacia vespero






LKK-anoj honoritaj




*Renkontiĝo de
aŭskultantoj de
Radio Pekino*

En la kunsido de EPĈ-legantoj





La ĉina eksprese




Ĉe-kurso

Veteranaj esperantistoj





En la kongresa libroservo




Ren Yu, projektinto de la filatela tutaĵo, subskriba






En la junulara vespero





Kunsido de kongresaninoj aranĝita de la Ĉina Virina Federacio




Kongresanoj reciprokas insignojn.

por kongresanoj.


Kongresanoj en diservo







Piedludo de ombrejoj en la nacia vespero

La ĉina danco-dramo "Silka Vojo" en la nacia vespero



Kanada kantistino Joëlle Rabu en la koncerto






Japana danco en la internacia arta vespero

Sur la Granda Muro





Supren




Ĉe maŭzoleo de Ming-dinastio




Fotado en antikvaj ĉinaj kostumoj

En la Longa Koridoro de la Somera Palaco






En la Imperiestra Palaco



Antaŭ Foŝjang-turo en la Somera Palaco

Sur Tjan'anmen-placo






Ĉina kuracisto kuracas kongresaninon per akupunkturo.


Renkontiĝo de handikapuloj

Amikaj renkontiĝoj









Ĉinio en ĉi tiu kaj tiu numero raportas pri diversaj aferoj. Ĉiu povas trovi en ĝi ion por si. La Radio Zagrebo elsendas nur unufoje semajne dek kvin minutojn. Sed tamen en tiuj 15 minutoj, kiam ajn prezentiĝas okazo, mi trovas tempon por doni ne longan sed tamen bonan recenzon pri El Popola Ĉinio.”

Profesoro Juan Régulo Pérez, iniciatoro de la eldonejo Stafeto kaj membro de la Akademio de Esperanto, faris parolon pri formoj de uzado de Esperanto. Li diris, ke la legado de El Popola Ĉinio informis lin pri konstruomanieroj kaj pri formoj de uzado de Esperanto. Laŭ lia kompreno, tio estas unu el la plej grandaj kaj gloraj atingoj de tiu revuo — la instruado de bona, pura, klara Esperanto. Li aŭdis, ke la revuo EPC ne uzas neologismon, tio ne estas vero. Multajn neologismojn li lernis en El Popola Ĉinio.

S-ro Andrzej Pettyn, akademiano kaj respondeculo de la

Esperanta sekcio de la Radio Polonia de Pollando, samopiniis kun prof. Régulo Perez pri la uzado de Esperanto. Krome li parolis ankaŭ pri la opinioj de polaj aŭskultantoj koncerne El Popola Ĉinio. Li diris: “Kun la korespondaĵoj al Radio Polonia venas ankaŭ fotoj, kiuj montras, ke El Popola Ĉinio estas vaste uzata en diversaj ekspozicioj, por la informado pri la nuntempa Ĉinio, belaj koloraj numeroj de El Popola Ĉinio pendigitaj en ekspoziciaj lokoj bone allogas la preterpasantojn. . . Tiu revuo estas ne tre moderna, eĉ mi avertas, ke ĝi ne fariĝu tro moderna. Oni sekvu ian propran linion, kaj ne subiĝu al diversaj tendencoj. Ĝi estas vere plaĉa en paĝigo, la arta prilaboro, la alta nivelo de la fotoj, kaj ĉio ĉi kaŭzas, ke oni volonte ne nur trafolumas, sed ankaŭ legas la revuon. . . Kun granda ĝojo mi akceptis ankaŭ multajn novajn ciklojn, kiujn oni enkondukis, pri Tibeto, pri malfermitaj urboj, pri diversaj turi-


smaj allogaĵoj de Ĉinio. Ĉio ĉi montras, ke la redakcio bone utiligas la rimarkojn, kiuj venas kune kun la enketiloj. Tio ĉi estas bona kunlaboro inter la redakcio kaj la legantoj.”

S-ino Eva Farkas-Tatár, hungara esperantistino kaj esploro-semanto de Ĉe-metodo, prezentis al la redakcio aktivan proponon. Ŝi diris: “Ni volonte legus plurajn artikolojn aŭ novelojn aŭ poemojn, do ion el la ĉina literaturo. . . Kaj mi kun granda ĝojo iam legis tian artikolon en El Popola Ĉinio pri praaj kurac-metodoj.” Samopiniis ankaŭ pluraj ĉeestantoj.

S-ino Ursula Grattapaglia, unu el la gvidantoj de la Esperanta vilaĝo-organizo de Brazilo, aktivulo de Esperanto-movado, informis novaĵon al la laborantoj de EPC. Ŝi diris, ke en Brazilo oni vendas ĉemizon kun El Popola Ĉinio skribita sur ĝi. Post la kunsido ŝi donacis la ĉemizon alportitan de ŝi de la an-



Prof. Juan Régulo Pérez



D-ro Jozsef Kondor

tipodo de nia planedo al respondeculo de EPC.

Ĉe la kunsido s-ro Gälmo Gunnar el Svedio rakontis al la ĉeestantoj rakonton, kiu ridigis la tutan salonon. Li diris: "Antaŭ du jaroj mi aŭdis rakonton de sudamerika esperantisto, kiu diris, ke li en sia lando instruis kurson de Esperanto. Kaj por ke liaj instruatoj havu bonajn legaĵojn, li rekomendis al ili

aboni El Popola Ĉinio, kaj ĉiuj fakte faris tion, kaj verŝajne ĉiuj menciis la nomon de tiu instruisto. Kaj eble por ŝpari sendkoston, li diris, la redakcio de El Popola Ĉinio ne sendis al ĉiu nova abonanto po unu ekzempleron, sed sendis tutan pakaĵon de la revuo al tiu instruisto. Bedaŭrinde, tio estis sufiĉe danĝera en tiu lando, ĉar tiu lando havis registaron ege

kontraŭ Ĉinio, do li tamen ricevis la pakaĵon, kaj post kelkaj horoj frapis policisto al lia pordo, kaj prenis lin al la ĉefpolicisto de tiu urbo. La ĉefpolicisto demandis lin, ĉu li importis tiun danĝeran revuon por propagandi komunismom. Nu, feliĉe estas sufiĉe inteligenta la instruisto, kaj li havis longan interparolon kun tiu ĉefpolicisto. Kaj finfine li sukcesis ne nur klarigi, ke la revuo tute ne temas pri politika propagando, sed eĉ esperantistigi la ĉefpoliciston."



S-ino Maria L. Murphy

S-ro Stanislaw Swistak el Pollando, prezidanto de LKK por la Centjara Jubileo de Esperanto, prezentis sian esperon al El Popola Ĉinio. Li diris: "En la venonta jaro okazos en Varsovio la 72-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni supozas, ke El Popola Ĉinio bone kunlaboros kun Pola Esperanto-Asocio, se temas pri disvastigo de la 72-a UK."




S-ro Andrzej Pettyn

Ĉe la kunsido, iuj esprimis sian deziron, ke El Popola Ĉinio aperigu pli da humuraj bildrakontoj, malfermu rubrikon "Virinoj", konigu verkanton kaj tradukanton de la artikoloj, plidetaligu la geografiajn nomojn sur la mapo, plibonigu la kvaliton de nigraj-blankaj fotoj, uzu Esperantan fonetikon kaj konigu popolan vivon de aliaj landoj.

La kunsido daŭris du horojn. Multaj legantoj levis sian manon por paroli, sed pro tempolimigo, la kunsido ne povis daŭri plu. Tion konsiderinte antaŭ la kunsido la redakcio distribuis enketilojn. 56 legantoj tuj skribis siajn opiniojn sur la enketiloj kaj donis al la redakcio. La enketiloj montras, ke iuj estas malnovaj

legantoj ekde la apero de EPC. Pli ol duono estas novaj legantoj de post 1980. Aliaj ŝatas la komposton, preson kaj paĝaranĝon de EPC kaj opinias ke la artikoloj de EPC estas fluaj, klaraj kaj facile legeblaj. Ankaŭ estas iuj, kiuj opinias ke frazoj de EPC estas multvortaj, ripetaj kaj stereotipaj. Pli ol duono de la legantoj esprimis ke ili volas fari ekspozicion por ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj. Iuj donis bonajn proponojn, ekzemple kompili libron el la artikoloj sub la rubrikoj "Por Via Sano" kaj "Ĉinlingva Kurso" kaj oni devas skribi la ĉinajn proprajn nomojn laŭ la han-lingva latiniga sistemo kaj aldoni Esperantan transkribon interkrampe.

Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero



1. Nanping
2. Ljanĝjang-gubernio
3. Minĝjang-rivero
4. Uji-monto
5. Ganĝjang
6. Ŝanhajo
7. Hangĝoŭ
8. Gujlin
9. Ŝaŭŝing
10. Ĉingdaŭ

ĈINA GAZETARO KAJ UK

de ŜJAŬ PING

De la lastaj jaroj la ĉina Esperanto-movado vigle progresas. Tion ni ŝuldas ĉefe al la flegado de la ĉina registaro kaj helpo de famaj personoj el diversaj sociaj rondoj, kaj ankaŭ al la subteno de la ĉina gazetaro. Multaj ĵurnaloj, gazetoj, radiostacioj kaj televidstacioj de Pekino kaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de tempo al tempo raportas pri la Esperanto-movado, konigas sciojn pri Esperanto kaj ĝiajn idealon kaj praktikan valoron. La plej renoma ĵurnalo en Ĉinio *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*) kun milionoj da legantoj kaj la plej influa ĵurnalo *Guangming Ribao* (*Lumo*) raportas pri UK ĉiujare. Ankaŭ *China Daily* (*Ĉina Ĵurnalo*) ofte publikigas novaĵojn pri la ĉina Esperanto-movado. Iuj radiosta-

cioj kaj televidstacioj funkciigas Esperanto-kurson. Tiuj publikaj opinioj kreis tre favorajn kondiĉojn por glata disvolvo de la ĉina Esperanto-movado.

SUBTENO DE GVIDANTOJ

La subteno de la ĉina gazetaro al Esperanto venis ĉefe de ĝia gvidantaro kun multaj subtenantoj de Esperanto. Inter ili iuj, kiuj lernis Esperanton aŭ havis kontakton kun Esperanto en la 30-aj jaroj, nun estas membroj de la societo Amikoj de Esperanto, kaj aliaj, kiuj havas intiman rilaton kun landfamaj esperantistoj, bone scias pri Esperanto. En la Honora Komitato de la 71-a UK estis 11 personoj el la ĉina gazetaro, t.e. kvarono de la tuta membraro. Ili estas gvidantoj de la ĵurnaloj *Renmin Ribao*, *China Daily*, *Guangming Ribao*

kaj *Ekonomia Ĵurnalo*, Radio Pekino kaj Centra Televidstacio. Ili donis grandan atenton al la kongreso.

RAPORTOJ ANTAŬ LA 71-a UK

Antaŭ du jaroj *Renmin Ribao* kaj *Guangming Ribao* jam publikigis la informon, ke la 71-a UK okazos en Pekino en 1986. De tiam ĵurnaloj kaj radiostacioj rimarkinde plimultigis siajn raportojn pri Esperanto. Iuj ĵurnaloj kaj gazetoj ofte publikigis informon pri varbado de lernantoj far diverslokaj korespondaj Esperanto-lernejoj.

La 18-an de marto ĉi-jare, *Renmin Ribao* refoje informis, ke la 71-a UK okazos en Pekino je la fino de julio. La 5-an de junio la ĵurnalo aperigis longan paroladon de Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, responde al Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de *Hungara Vivo*, sub la titolo "Ĉinio Ĉiam Subtenas Esperanton", kio vekis grandan eĥon ĉe diversaj socitavoloj.

Por bonvenigi la 71-an UK la gazeto *Zhongguo Wenhua Bao* (*Ĉina Kulturo*) eldonita de la ĉina gvida kultura departemento starigis novan rubrikon pri Esperanto, en kiu aperis la artikolo-

Ĉinaj ĵurnaloj raportis pri la 71-a UK.





Raportistoj

loj “Disvastigo de Esperanto en Ĉinio”, “UEA kaj UK” k.a.

En siaj enlanda kaj eksterlanda eldonoj la landfama semajna gazeto *Liao Wang (Observado)* aperigis la artikolon “Esperanto en Ĉinio”, kiu detale prezentis la historion de la ĉina Esperanto-movado.

La 12-an de julio la vaste distribuata gazeto *Zhongguo Guangbo Bao (Ĉina Radio-Programo)* publikigis tri artikolojn pri la historio de Esperanto, la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino kaj UK.

Antaŭ la 71-a UK la ĵurnalo *China Daily* prezentis progreson de la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj.

INTERVJUO KOMENCIĜIS DE ĈI TIE

Por sukcesigi la raportadon pri la 71-a UK kaj pligrandigi la influon de Esperanto en la socio, la 18-an de julio LKK de la 71-a UK okazigis kunsidon por ĉinaj ĵurnalistoj. En la kunsido ĝi konigis al ili la preparan laboron kaj disdonis inter ili materialojn pri Esperanto kaj la 71-a UK.

La 25-an de julio prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens kaj aliaj gvidantoj okazigis kunsidon por ĵurnalistoj ĉinaj kaj alilandaj. Ili prezentis al la ĉeestantoj la celon kaj signifon de la 71-a UK kaj informis la preparan laboron pri la centjara jubileo de Esperanto.

Ĵurnalistoj kaj laborantoj el dekoj da organizoj de Pekino kaj aliaj lokoj partoprenis la kunsidon. Dum la kunsido iuj ĵurnalistoj jam interparolis kun laborantoj de la kongreso pri sia intervjuo plano, aliaj parolis kun gvidantoj de UEA por difini intervjuan tempon, kaj multaj ĵurnalistoj postulis la kongresan tagordon kaj parolado-kopiojn de la gvidantoj ĉe la inaŭguro. Tiel komenciĝis la intervjuo.

FORTO DE LA PUBLIKA OPINIO

109 ĵurnalistoj partoprenis la kongreson. Laŭdire, la nombro rompis la rekordon de la antaŭaj kongresoj tiuflanke.



Akcepto por ĉinaj kaj alilandaj ĵurnalistoj

Antaŭtagmeze de la 27-a de julio ĵurnalistoj de diversaj ĵurnaloj, gazetoj, radiostacioj kaj televidstacioj frue venis en la kongresejon Ĉina Teatro por koni la tagordon de la kongreso kaj elekti plej taŭgan pozicion por foti kaj sonregistri. Kiam en la kongresejo eksonis la inspira kanto "La Espero," ili rapide kaptis la scenon kun historia signifo, en diversaj anguloj.

La sekvan tagon post la inaŭguro la ĉefaj pekinaj ĵurnaloj raportis pri ĝi kun okulfrapa titolo en la unua paĝo, la Centra Televidstacio elsendis televidan novaĵon pri la inaŭguro kaj ankaŭ Radio Pekino elsendis novaĵon pri la solena inaŭguro al la aŭskultantoj en- kaj eksterlandaj.

La redaktoroj kaj raportistoj de El Popola Ĉinio ĉiuj sin ĵetis en la intervjuan aktivadon. Iuj el ili laboris tage kaj nokte por aperigi la kongresan kurieron "Al la Nova Etapo". Dank' al ilia diligenta laboro la kongresanoj povis legi diversajn informojn

pri la kongreso ĉiumatene. Iuj faris intervjuon por la kongresa numero de EPĈ.

Ĉiutage ĵurnalistino de *Guangming Ribao* de malproksime venis per aŭtobuso al la kongresejo. Ŝi intervjuis pri la kongresa temo, la Internacia Kongresa Universitato (IKU), scienca kaj faka aplikado de Esperanto kaj pri la kunsido de virinoj kaj faris vivoplenan raporton.

Du ĵurnalistoj de la gazeto *Zhongguo Qingnian Bao* (Ĉina Junularo) intervjuis s-ron Jackson, prezidanton de TEJO, kaj junajn esperantistojn de Francio, Japanio, Svedio k.a. kaj raportis pri tio.

La 30-an de julio, sur alarmaj turoj de la Granda Muro oni vidis, ke la raportistoj de la Pekina Televidstacio haste filmas grim pantajn esperantistojn kaj diversajn aktivadojn de esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj kun flirtantaj verdaj flagoj. Tiu ĉi filmista grupo konsistis el 9 ĉ. 20-jaraj junuloj. Dum la kon-

greso ili intervjuis esperantistojn en- kaj eksterlandajn kaj filmis la ĉefajn aktivadojn de la kongreso. Ili prezentos al la vastaj esperantistaro kaj neesperantistaro specialan televidfilmon kun la titolo "Verdstela Esperantujo".

De la fino de julio ĝis la mezo de aŭgusto la ĉinaj ĵurnaloj kaj radiostacioj faris originalajn raportojn pri la UK. Laŭ nekompleta statistiko, diversaj ĵurnaloj, radiostacioj kaj televidstacioj publikigis pli ol 110 artikolojn kaj informojn.

Raportoj ne nur kreis fortan publikan opinion en diversaj lokoj de Ĉinio, sed ankaŭ havis influon en Hongkong kaj Aŭmen, kaj eĉ en iuj landoj de sudorienta Azio. La hongkong-aj ĵurnaloj *Dongfang Ribao*, *Dagongbao*, *Wenhuibao*, *Jingbao*, *Zhongbao*, *Aŭmen Ribao* kaj la tajlanda ĵurnalo *Xinzhongyuan* aperigis koncernajn informojn liveritajn de la Ĉina Novaĵ-agentejo.

La raportoj de la ĉina gazetaro pri la kongreso vekis ĉe la

publiko grandan intereson pri Esperanto. Ĉ. 2 000 kongresanoj el 54 landoj kaj regionoj senĝene interparolis pri amikeco kaj faris kulturan interŝanĝon en la sama lingvo Esperanto, kaj tio aparte interesis ĉinojn. Post la kongreso la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto ricevis dekojn da leteroj (inkluzive de 7 leteroj el Aŭmen) kun la demandoj, kie oni povas aĉeti Esperantajn librojn kaj sonbendojn, kiam la instituto varbos lernantojn kaj ĉu oni nun povas anonci sin kiel lernantojn. Iuj eĉ venis rekte al la Libroservo de EPC por aĉeti koncernajn materialojn.

Ĵurnalistoj en la kongreso propraokule vidis rolon kaj valoron de Esperanto kiel internacia helpa lingvo. Iuj el ili postulis de laborantoj de la kongreso Esperantajn lernolibrojn kaj vortarojn. Ĵurnalistoj de la gazeto *Ĉina Junularo* kaj Novaĝ-agentejo Ŝinhŭa jam komencis lerni Esperanton. Iuj eĉ esprimis sian deziron intervjui per Esperanto la venontan UK.



ABONU

“EL POPOLA ĈINIO”!

Nun komenciĝas 1987-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiu, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1986 10 01 ĝis 1987 02 28), ricevos tradician ĉinan rulpentraĵon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPC

(Ekvalidas de la 1-a de oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON
NI SENDOS LAŬ PETO.



D-ro Sun Jatsen

Sun Jatsen estas bone konata ne nur de la ĉinoj, sed ankaŭ de eksterlandanoj. Li estas granda ĉina revolucia pioniro, kiu sin oferis por realigi en Ĉinio la nacian sendependecon, demokratian liberon kaj feliĉan vivon de la popolo. Li estas ĉiam amata de la ĉina popolo kaj respektata de la popoloj de la mondo.

La 12-an de novembro 1866, Sun Jatsen naskiĝis en kamparana familio de Ŝjangŝan-gubernio (la hodiaŭa Ĝongŝan-urbo) de Gŭangdong-provinco. Li kreskis en la epoko, kiam la internaciaj kapitalismaj fortoj komplotis kun la ĉinaj feŭdaj fortoj kaj Ĉinio falis en la duon-kolonian kaj duon-feŭdan staton.

KOMENCO DE LA REVOLUCIAJ AFEROJ

En sia hejmloko Sun Jatsen trapasis sian infanecon. 10-jara, li eklernis en privata lernejo kaj 12-jara li veturis eksterlanden lerni en Honoluluo. Post reveno al Ĉinio, li lernis en la Nanhŭa-a Medicina Lernejo de Kantono en 1886 kaj en la sekva jaro li eklernis en la Okcidentmedicina Instituto en Hongkong. En 1892 post diplomitiĝo el la instituto, li laboris kiel kuracisto en Aŭmen, Kantono kaj aliaj lokoj, kaj konatiĝis kun patriotoj. Junie de 1894, li letere proponis politikan reformadon en Ĉinio al Li Hongĝang, ĉefo de la okcidentiga movado kaj grava kortegano de Ĉing-

SUN JATSEN, GRANDA REVOLUCIA PIONIRO DE ĈINIO

— Memore al la 120-a jubileo
de lia naskiĝo

de ĜENG ZEMIN

dinastio (1644-1911), sed tiu rifuzis la reformadon. Sun do suriris sur la vojon renversi la regadon de Ĉing-dinastio per revolucio. En novembro 1894 en Honoluluo, Sun Jatsen fondis Ŝingĝonghuj, la plej fruan burĝan revolucionan societeton de Ĉinio kun la celo prosperigi Ĉinion. En la sekva jaro li preparis arman leviĝon en Kantono kontraŭ Ĉing-dinastio, sed malsukcesis lia plano. En oktobro 1896, li fuĝis al Londono kaj tie estis forkaptita de membroj de la ambasadejo de Ĉing-dinastio en Britio. Poste li liberiĝis helpate de siaj anglaj amikoj. Post tio, li serioze esploris la kapitalisman socion en eŭropaj landoj, diligente studis la politikan kaj ekonomian teoriojn. En 1900, li decidis fari arman leviĝon en Hujĝoŭ de Gŭangdong kontraŭ Ĉing-dinastio, post ĝia malsukceso li daŭre faris revoluciajn aktivadojn eksterlande.

DE TONGMENGHUJ AL LA REVOLUCIO DE 1911

Daŭrigante la revolucionan tradicion de antaŭuloj, Sun Jatsen faris ĉion eblan por puŝi la disvolviĝon de la burĝa demokratia revolucio en Ĉinio. Aŭguste de 1905 en Japanio, surbaze de la revoluciaj organizoj Ŝingĝonghuj kaj Hŭaŝinghuj kaj kune kun aliaj revoluciuloj, li fondis Ĉinan Tongmenghuj kaj estis elektita kiel ĝia


prezidanto. Tiam Sun Jatsen difinis la politikan programon de burĝa demokratia revolucio “peli manĉurojn, restarigi Ĉinion, establi respublikon kaj egaligi la terposedantecon”, fondis la gazeton “Min Baŭ”, prezentis la doktrinon de Tri Popolaj Principoj pri “naciismo, demokratio kaj la popola vivo”, faris akran polemikon kontraŭ reformistoj kaj vastan revolucionan propagandon.

De 1907 ĝis 1911 en la provincoj Gŭangdong, Gŭangŝji kaj Junnan, Sun Jatsen faris okfoje armajn leviĝojn sinsekve kontraŭ la reĝimo de Ĉing-dinastio, kiuj kvankam malsukcesis tamen havis profundan kaj vastan influon. La 10-an de oktobro de 1911 eksplodis la Uĉang-a Leviĝo, kiun eĥis pluraj provincoj de Ĉinio. Tio estis la fama Revolucio de 1911. Tuj poste, Sun Jatsen, loĝanta eksterlande, vojaĝis de Ameriko al Eŭropo por fari diplomatajn aktivadojn kaj gajni subtenadon de la koncernaj ŝtatoj. La revolucio renversis la putran regadon de Ĉing-dinastio kaj finis la monarkion, kiu daŭris en Ĉinio pli ol 2 000 jarojn. La 25-an de decembro Sun Jatsen revenis Ŝanhajon. En la 1-a de januaro 1912, li venis al Nankino kaj ekfunkciis kiel provizora prezidanto de la Respubliko de Ĉinio. En tri monatoj la nova registaro publikigis nombron da politikoj kaj dekretoj utilaj al la demokratia reĝimo kaj nacia ekonomio. Marte la registaro publikigis la “Provizoran Konstitucion de la Respubliko de Ĉinio” kun karakteroj de burĝa respubliko. Tamen la tiama granda militaristo Jŭan Ŝikaj devigis la revoluciulojn doni al li la novan regpotencon. En aprilo Sun Jatsen oficiale abdikis. La prezidanteco estis uzurpita de Jŭan. Malsukcesis la granda Revolucio de 1911.

POR LA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

Post abdiko de Sun Jatsen, parto de la revoluciistoj opiniis, ke iliaj estontaj taskoj estas prosperigi industrion kaj komercon aŭ fari la parlamentan batalon. En aŭgusto, Tongmenghuj estis reorganizita en Kuomintangon kaj Sun Jatsen estis elektita kiel ĝia prezidanto. En 1913 Song Ĝjaŭĵen, unu el la gvidantoj de Kuomintang, estis murdita de sekreta sendito de Jŭan Ŝikaj. Pro tio Sun Jatsen senhezite decidis la arman batalon kontraŭ Jŭan. Julie en Hukoŭ de Ĝjangŝji-provinco kaj Nankino de Ĝjangsu-provinco, li levis la “Duan Revolucion” kontraŭ Jŭan kaj post malsukceso de la revolucio li fuĝis al Japanio. En julio 1914 en Tokio de Japanio, kolektinte parton da revoluciuloj, li fondis la Ĉinan Revolucionan Partion kaj estis elektita kiel ĝia prezidanto por daŭrigi la bataladon kontraŭ Jŭan. Tamen ĝi ne ludis pli gravan rolon en la politika vivo en Ĉinio pro manko de kuraĝigaj fortoj en la programo kaj sekreta formo en la organizo kaj agado. En 1917 li gvidis la Konstituciprotektan Movadon en la suda regiono de Ĉinio, por batali kontraŭ la nordaj militaristoj, daŭrigantoj de la reakciaj aferoj de Jŭan, kaj protekti la “Provizoran Konstitucion de la Respubliko de Ĉinio”. En 1919 la Ĉina Revolucia Partio estis reorganizita en Kuomintangon de Ĉinio. En majo de 1921 en Gŭangdong-provinco, Sun Jatsen ekfunkciis kiel eksterordinara prezidanto. Tiam, kvankam li dufoje fondis la militan registaron en Gŭangdong-provinco por gvidi la norden-militiron kontraŭ la reakciaj fortoj, tamen li malsukcesis, pro la treege potencaj imperiistaj kaj feŭdmilitaristaj fortoj de Ĉinio kaj pro manko de findindaj fortoj.

D-ro Sun Jatsen en la inaŭguro de la fondiĝo de la Respubliko de Ĉinio



GRANDA ŜANĜIĜO


La granda Oktobra Revolucio de Rusio multe kuraĝigis Sun Jatsen, kiu estis hezitanta en la revolucia vojo. En krizo li akiris sinceran helpon de la Komunista Internacio kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Li resumis la spertojn kaj lecionojn de la revolucio en la pasinteco kaj komencis sian ŝanĝiĝon plej grandan en la tuta vivo. Li decidis reorganizi Kuomintangon, fari kunlaboron kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj bonvenigi la kompartianojn aliĝi al Kuomintango kiel individuoj. De septembro 1922, li multfoje okazigis en Ŝanhajo kunvenon por diskuti pri reorganizo de Kuomintango. En januaro de 1923, li publikigis la "Deklaron de la Ĉina Kuomintango", kiu montris, ke "la revoluciaj aferoj estas iniciatataj de la popolamasoj kaj sukcesigataj ankaŭ de ili". En la deklaro li proponis revizii la neegalrajtajn traktatojn subskribitajn de Ĉing-kortego kaj imperiismaj landoj. En la tria tagdeko de januaro, estis publikigita la "Deklaracio de Sun Jatsen kaj Ioffe" (Ioffe estis la sovetia delegito). Ambaŭ flankoj asertis, ke "la plej urĝa problemo de Ĉinio estas realigi unuiĝon de la Respubliko de Ĉinio kaj tutan sendependiĝon de la lando."

Junie de 1923 la Komunista Partio de Ĉinio okazigis en Kantono sian Trian Tutlandan Kongreson, kiu determinis la politikon fondi revolucion unuecfronton kun Kuomintango kaj multflanke helpi Sun Jatsen. Tiam, Sun daŭrigis sian



D-ro Sun Jatsen (la dua de dekstre) kaj Li Daĝaŭ (la unua de maldekstre), unu el la gvidantoj de la Komunista Partio de Ĉinio, en januaro 1924

reorganizadon de Kuomintango, sendis delegacion al Sovetunio por fari esploradon kaj engaĝis sovetiajn politikajn kaj militajn konsilistojn. Pro la agreso de imperiistoj al Ĉinio kaj ilia malamika sinteno kontraŭ la regpotenco en suda Ĉinio, Sun ekkonis la veran vizaĝon de la imperiistoj. Li diris: "La kapitalismaj landoj certe ne simpatias al nia partio. Al ni simpatias nur Sovetunio kaj la subpremataj nacioj kaj popoloj." Li deklaris, ke imperiistoj estas la veraj malamikoj de Ĉinio. Por batali kontraŭ la malamikoj, li persistis en la politiko alianciĝi kun la internacia



D-ro Sun Jatsen kun armeanoj kaj registaraj funkciuloj antaŭ la Oficejo de la Provizora Prezidanto en 1912

kaj enlanda laboristaroj spite la malhelpon de la dekstruloj de Kuomintango. Li plurfoje montris: "Por la nuna ĉina revolucio ni nepre devas lerni de Rusio."

FORMIĜO DE LA NOVAJ TRI POPOLAJ PRINCIPOJ

Januare de 1924, Sun Jatsen okazigis en Kantono la Unuan Tutlandan Kongreson de Kuomintango, kies ĉefa enhavo estis reorganizi la partion. La kongreso markis la oficialan formiĝon de la unua kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio. La kongreso aprobis la politikan tezon de la Komunista Partio de Ĉinio pri opono kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kaj decidis la tri grandajn politikojn pri alianciĝo kun Rusio, kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj helpo al la kamparanoj kaj laboristoj. Laŭ la spirito de la tri grandaj politikoj, en la deklaro de la kongreso Sun Jatsen ŝanĝis la malnovajn Tri Popolajn Principojn en la Novajn Tri Popolajn Principojn revoluciajn. Ĝia naciismo celas "unue la liberigon de la ĉina nacio mem", t.e. batalon kontraŭ imperiistoj; kaj "due egalrajtecon de ĉiuj naciecoj en Ĉinio", t.e. abolon de la nacia subpremado interne de Ĉinio. Ĝia demokratio celas "doni la regpotencon al la popolo", t.e. praktiki la demokratian politikon. Ĝia principo pri la popola vivo celas egaligi la terposedantecon, limigi la privatan kapitalon kaj oponi kontraŭ la "monopolo de terposedo de malmultaj homoj," kaj kontraŭ "monopolo de la privata kapitalo super la ŝtata ekonomio kaj popola vivo". Poste, li ankaŭ proponis, ke "ĉiu pluganto havu sian teron" k.a. La novaj Tri Popolaj Principoj fariĝis la politika bazo de kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio.

En majo Sun Jatsen fondis la Hŭangpu-an Militlernejon en Kantono. Lernante de la armeo de Sovetunio li paŝon post paŝo fondis la Nacian Revolucian Armeon. Samtempe, por akceli la laborist-kamparanan movadon en Gŭangdong-provinco kaj la tutlandan revolucion, li fondis la institutojn de kamparana kaj laborista movado por kulturi revolucionan eliton. En septembro, por batali kontraŭ la nordaj militaristoj li decidis denove fari norden-militiron imite tiun en 1922. Tiujare li mobilizis ankaŭ la revoluciajn fortojn batali kontraŭ la milita kaj financa subpremado de imperiistoj al Ĉinio kaj sukcesigis la reprenon de la resta parto de la doganoj, subtenis la strikon



D-ro Sun Jatsen kaj lia edzino Song Ĉing-ling en Kantono en 1917

en Ŝa'mjan de Kantono, frakasis la ribelon de la komercista bando, ĉio ĉi faris Kantonon firma revolucia bazloko. En novembro, por akceli pli fruan unuiĝon de la tuta Ĉinio, Sun Jatsen norden vojaĝis por la ŝtataj aferoj kun koncernaj gravaj personoj en norda Ĉinio. Por daŭre batali kontraŭ imperiistoj kaj la nordaj militaristoj, li proponis okazigi la popolan kongreson kaj aboli la neegalajn traktatojn inter Ĉinio kaj fremdaj landoj.

La 12-an de marto 1925 Sun Jatsen mortis pro malsano en Pekino. En sia testamento li diris: "Ni devas vekigi la popolamasojn kaj alianciĝi kun la tutmondaj nacioj egalrajte traktantaj nin por komuna batalo."

La grandaj kontribuoj de Sun Jatsen por la ĉina revolucio ĉiam restas en la memoro de la ĉina popolo. Ni ĉiam lernas liajn ardan patriotismon, senlakan luktemon kaj noblajn moralojn.

VOJAĜO EN FUGĜJAN (I)

En pluva tago mi sola venis al Fuĝjan, sudorienta marborda provinco de Ĉinio, por intervjuo. Tie mi vizitis pli ol dek guberniojn kaj urbojn en unu monato. Kiam mi revenis laca al Pekino kun kelkaj kilogramoj da intervjuo-materialoj kaj taglibro kun dekmiloj da vortoj, min tuj atakis neesprimebla sopiro. Kvan-kam ne ĉiuj spertaĵoj sur tiu verda kaj malseka tero estis agrablaj, tamen mi sopiras pri ĝi, ĉar ĝi estas plena de viveco.

“VERDA TREZOREJO”

Antaŭ ol la trajno atingis Fuĝjan-provincon, iu loka pasaĝero fiere diris al sia najbaro:

“Kiam vi vidos arbojn prosperajn sur montetoj, tiam nia trajno veturos jam en Fuĝjan-provincon.”

Jes, verdaĵo ekfrapis niajn okulojn, tuj kiam la trajno eniris la provincon, kiel atendite.

La provinco estas konata kiel “sudorienta montara lando”. Ĝiaj montetaroj 200 metrojn super la marnivelo kovras 85% de ĝia totala areo, kaj ĝia arbara areo konsistigas 39.5% de ĝia totala areo kaj okupas la duan lokon en la lando. Tie kreskas pli ol 3 000 specioj de plantoj, ĉ. 7-oble kiom tiuj en la eŭropa kontinento. En la lastaj jaroj la

popolo de Fuĝjan energie ekspluatis la montregionojn, plantis arbojn, teon kaj herbojn por transformi la ekologian medion, kaj disvolvis bredadon de herbovoraj bestoj kaj diversajn ekonomiajn entreprenadojn, kio senĉese ŝanĝis la montregionan fizionomion.

ARBARA URBO

Mi elvagoniĝis en Nanping, malgranda urbo en la norda parto de la provinco.

Ĝi estas landfama arbara urbo kun totala areo de pli ol 2 000 kvadrataj kilometroj. Ĝia arbara areo (180 000 hektaroj) konsis-



Arbidoj sur Ujimonto

tigas 66.9% de ĝia totala teritorio. Ĝia produktokvanto de kunningamia (*Cunninghamia*) ligno okupas la unuan lokon en la provinco kaj ĝia forstokultura areo konsistigas 82% de ĝia teritorio. Ĉiu ĝia loĝanto liveras ĉiujare al la ŝtato meze po unu kubmetron da ligno.

Tiu urbo kun 400 000 loĝantoj estas kvieta kaj pura. Ĉie prosperas verdaj arboj, precipe en parkoj, ambaŭflanke de stratoj, ĉirkaŭ loĝejoj kaj en kortoj, kio faris la kvietan urbon vigleplena. La Nanping-anoj fiere diris: "Ni enkondukis arbaron en niajn urbon."


FLEKSEBLA ADMINISTRADO

Nun la ŝtataj forst-administracioj praktikas flekseblan politikon en forstokulturo, eĉ permesas al individuoj planti arbojn sur monto laŭ kontrakto kaj al iliaj gefiloj heredi ilian posedrajton. Tio ne nur multe ekscitis la aktivecon de la forstokulturistoj, sed ankaŭ akcelis la disvolvon de la popola forstumado.

Je Jongĝin, juna laboristo de la Nanping-a Paperfabriko, ricevis permeson rezervi la oficon, sen postuli salajron, por fondi la Jongĝin-an Forstuman kaj Verdigan Kompanion. Laŭ kontrakto li kulturos 200 hektarojn da arboj sur dezerta monto. La kontrakto validas por 25-30 jaroj kaj 70% de la enspezo el la arboligno apartenos al li mem. Lastjare la kompanio plantis 80 hektarojn da poploj kaj 140 hektarojn da masonianaj pinoj (*Pinus masoniana*). Inter la arbidoj ĝi kulturis bambusojn, grenojn kaj drogherbojn kaj bredis kortobirdojn.

Je Jongĝin kun plena fido diris: "Mi volonte min dediĉos al tiu afero."

*La arbohakejo
Ŝajang*



ELEKTRAJ POTOJ KAJ EKOLOGIA EKVILIBRO

En Nanping mi gastis ĉe iu forstokulturisto en forstoprodukta regiono de Ŭanmi-monto. Mi

miris, ke la mastrino preparas manĝon per elektra poto. La multekostaj elektraj potoj ankoraŭ ne estas vaste uzataj en urboj, ili tamen eniris en la ordi-

La rezervejo de Uji-monto



narajn forstokulturistajn familiojn, kio kompreneble montras ilian vivriĉecon. El nia babilado mi sciis ankaŭ, ke ili uzas elektrajn potojn ne nur pro oportuno, sed ankaŭ pro manko de hejtaĵo. Tio vekis ĉe mi demandon, kial mankas hejtaĵo al loĝantoj en forsta regiono.

Tio okazis kun historia kaŭzo. Antaŭe la ŝtataj arbohakejoj estis moviĝantaj. Ofte okazis, ke oni hakis anstataŭ planti. Tiel faris ne nur la arbohakistoj, sed ankaŭ iuj kamparanoj kaj loĝantoj. La nombro de la hakitaj arboj multe superis tiun de la plantitaj. Tia barbara hakado detruis primitivajn arbarojn kaj la ekologian ekvilibron. Granda kvanto da tero venis en Mingĝang, grandan riveron en la provinco, kaj la kampoj ĉe la montpiedo efte suferis inundon kaj sekegecon.

En Ŝjihoŭ apud Nanping, estro de iu arbohakejo plendis: "Antaŭe tie estis fama 'verda trezorejo'. Tiam tie kreskis senlima primitiva arbaro, sed nun ĝi jam

malaperis. Estas tre domaĝe, ke ni devigite hakas kuntingamiojn hakeblajn kutime post kvin jaroj."

En la lastaj jaroj la ŝtato donis grandan atenton al senbrida hakado en diversaj lokoj kaj ellaboris serion da arboprotektaj leĝoj bloki monton por kreskigi arbojn. Dank' al tio sendistinga hakado estas bridita. Nun sur Ŝanmi-monto antaŭe plene kovrita de arboj rekreskas prospera verda arbetaro.

DE UJI-MONTO AL LA ENFLUEJO DE MINGĜANG-RIVERO

Veturinte norden de Nanping tri horojn, mi atingis la faman Uji-monton.

La ĉarma monto kun krutaj rokoj unuj super aliaj estas nomataj de sciencistoj "viva biologia naturmuzeo", "natura botanika ĝardeno", "insekta regno", "regno de serpentoj" ktp.

Frumatene de la sekva tago mi sola iris al la monto. Pluvetis

senĉese, ĉio estis nebuleca, neniuj pasanto troviĝis sur la vojo, nur la pluvobruo akompanis miajn paŝojn. Mi neniam sentis, ke la naturo estas tiel proksima al mi. Allogate de kuriozaj floroj ĉe rivereto kaj bambuoj sur la monto, mi iris profunden de la verda mondo de vivaj estaĵoj. . .

De Uji-monto mi veturis orienten laŭ Mingĝang-rivero al Ljanĝang-gubernio ĉe ĝia enfluejo. Kiam mi staris fronte al la ĉarma maro apud Fuĝjan, mi trovis, ke la riĉa maro estas moviĝanta "blua banko", se Uji-monto estas rigardata kiel granda "verda trezorejo" de Fuĝjan.

La marbordo de Fuĝjan longas pli ol 3 300 kilometrojn, kun mara areo de pli ol 136 000 kvadrataj kilometroj. Ĝi havas pli ol 200 000 hektarojn da marborda tereno, kies triono taŭgas por brede marajn estaĵojn. La marborda tereno estas ebena kaj ĉirkaŭita de montetoj kaj insuletoj en tri flankoj ĝenerale kaj unuflanke tuŝanta la maron. Tie la tajdo flusas kaj malflusas sen-



Montanoj en geedziĝa festeno

bare kaj malrapide, abundas nutraĵo, kaj la loko taŭgas por bredi ostrojn, pektenojn, tridaknojn kaj aliajn rarajn marproduktaĵojn. El la 1 500 specioj de fiŝoj en la ĉinaj maroj 500 produktiĝas en la maro apud Fuĝjan-provinco, inkluzive de 100 ĉefaj fiŝspecioj kun ekonomia valoro. En la lastaj jaroj la provinco energie ekspluatis marajn riĉfontojn kaj disvolvis bredadon, kaptadon kaj prilaboradon de akvoproduktaĵoj, kio sendube havas grandan signifon por porsperigi ĝian ekonomion.

GASTADO EN FIŜVILAĜO

En Ljanĝjang-gubernio mi vizitis la fiŝvilaĝon Dongŝeng. Kiam mi aŭskultis la brilan historion de la vilaĝo rakontitan de la vilaĝestro en la luksa kaj komforta vilaĝa kunvenejo, kiam mi fumis superan cigaredon proponitan de la mastro en lia eleganta gastoĉambro kaj kiam mi rigardis televidon babilante kun fiŝistoj en ilia ŝipo, la nomo Dongŝeng forte frapis mian koron. Ĝi simbolas vigecon, riĉecon, belan perspektivon de la ĉinaj fiŝistoj. . .

Kiam mi venis al la fiŝista kinejo en la mezo de la vilaĝo, mian koron forte skuis kaduka ŝipo kuŝanta ĉe la kinejo. Antaŭ dudek jaroj la fiŝistoj de tiu vilaĝo ja vivis sur tiaj ŝipoj. Ili paŝigis jarojn sur maro kaj laboris per ekstreme simplaj instrumentoj.

La ŝanĝiĝoj kvazaŭ okazis antaŭ mi. Ili estas veraj kaj grandegaj. Kiel do ili okazis?

SEKRETO DE RIĈIGO

Rapide disvolviĝas la fiŝproduktado de la vilaĝo Dongŝeng, precipe ekde 1983, kiam oni rebonigis la fiŝproduktan administradon. La kolektive poseda-



Fiŝboatoj

taj 56 ŝipoj ĉiuj estis disponataj de fiŝistoj laŭ kontrakto. Ĉiu grupo libere organizita el 18 fiŝistoj disponis po unu ŝipon. La fiŝistoj multe laboras kaj multe gajnas, kio multe levis ilian aktivecon. Lastjare la fiŝproduktado estis ne tiel profita, tamen la totala produktovaloro de la vilaĝo atingis pli ol 10 milionojn da jŭanoj (3.70 jŭanoj egalas al unu usona dolaro) kaj ĉiu vilaĝano enspezis meze 3 000 jŭanojn.

En la komenco de la kuranta jaro la vilaĝo kolektis 3 milionojn da jŭanoj por konstrui surmaran bazon kun fiŝprilaborejo, fiŝspeklejo, fiŝpulvorigejo, fiŝfridejo kaj granda doko. Tio montras, ke la vilaĝo de sola fiŝkaptado produktado suriros la vojon disvolvi ekonomion de fiŝado, prilaborado kaj komercado, kaj tio prezentis pli vastan perspektivon de disvolvo.

KONTRAŬDIRO INTER RIĈO KAJ MALRIĈO

En tiu riĉa fiŝvilaĝo nature ekzistas akra kontraŭdiro de neegala enspezo inter fiŝistoj. Ekz. iuj ŝipoj kaptis malmultajn fiŝojn en sinsekvaj jaroj kaj su-

feris perdon aŭ alfrontas situacion vendi la ŝipon por kovri la perdon. Pro tio la vilaĝo asignis 1 760 000 jŭanojn speciale al la perdosuferintaj ŝipoj kiel kapitalon, samtempe ĝi ankaŭ mobilizis aliajn ŝipojn helpi ilin venki malfacilojn.

La monhelpo kompreneble ne estas efika rimedo. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke iuj fiŝistoj posedas neperfektan teknikon de fiŝkaptado en malproksima maro. Konsiderante tion, la vilaĝo starigis naŭ-membran scienc-esploran grupon pri fiŝproduktado, funkciigas regulajn kursojn pri produkta tekniko kaj fiŝkaptatekniko kaj sendis du junajn fiŝistojn studi en altlernejo. Tiuj prudentaj paŝoj havos profundan signifon por radikale ŝanĝi la postigintan teknikon kaj fondi specialigitan fiŝproduktan tru-



VOJO DE MEMLERNANTOJ

Ĉi tie ne estas lerneja domo, nek klasĉambro, sed funkcias oficialaj ekzamenejoj kun rigoraj reguloj. Ĉi tie ne estas profesiaj profesoroj, nek docentoj, sed miliono da diligentaj studentoj tra la tuta lando. Jen nova fenomeno aperinta en la lastaj jaroj, post kiam Ĉinio ekpraktikis politikon de superaeduka ekzameno al memlernantoj.

BONŜANCON AL LA MEMLERNANTOJ

En la lastaj dek jaroj rapide progresis la supera eduko en Ĉinio. Establiĝis centoj da altlernejoj kaj duobliĝis la nombro de studentoj, krome aperis televidaj altlernejoj, vesperaj altlernejoj

kaj korespondaj altlernejoj unuj post aliaj. Malgraŭ ĉio ĉi, la disvolviĝo de la supera eduko ankorau ne povas akordiĝi kun la bezonoj de konstruado de la ŝtato kaj kontentigi la deziron de junuloj viziti lernejon. En tiu nova situacio, la eduka departemento de Ĉinio ellaboris "Provizorajn Regulojn de Superaeduka Ekzameno al Memlernantoj" en 1980, kaj elektis Pekinon, Tjanĝin, Ŝanhajon kaj Ljaŭning-provincon kiel eksperimentajn punktojn ekde 1981.

La superaeduka ekzameno al memlernantoj estas speco de ŝtataj ekzamenoj. Ĝi estas sistemo por ekzameni memlernantojn kombinante personan mem-


lernadon, socian subvencion kaj ŝtatan ekzamenon. La ŝtato havas ĝenerale la samajn postulojn al tiuj memlernantoj kiel al la studentoj de altlernejoj en eduka celo, lernaj postuloj, lernoobjektoj kaj normoj de ekzamenoj, krom tio, ke la memlernantoj ne bezonas trapasi enirajn ekzamenojn kaj regule viziti lernejon. La komisiono pri ekzameno al memlernantoj respondecas pri la organizado de ekzamenoj, arkivoj de ekzamenoj, precipe pri garantio de kvalito de la ekzamenoj. La fakultatoj malfermitaj sub la direktado de la ŝtato estas dividitaj en institutajn kaj kolegiasajn. La ekzamenoj okazas ĉiujare dufoje. Oni donas atestilon al tiuj, kiuj sukcesis en la ekzameno de unu lernoobjekto. Sukcese trapasinte la ekzamenojn de ĉiuj difinitaj lernoobjektoj, ili ricevas diplomon. La ŝtato agnoskas ilian kvalifikon kaj ĝuigas al ili la samajn rajtojn kiel al diplomitaj studentoj de la ordinaraj altlernejoj.

La praktikado de ekzamenoj al memlernantoj en eksperimentaj punktoj ricevis grandan eĥon de la socio, precipe varman bonvenigon de la mezaĝuloj kaj junuloj ĝenerale. En Pekino proksimume dekmil junuloj sin anoncis por tiuj ekzamenoj. Kaj multaj oficejoj, organizoj, entreprenoj, lernejoj kaj eĉ individuoj organizas postlaboran lernejon, televidan kurson kaj radiodisaŭdigan kurson por helpi la memlernantojn.

Supera ekzameno de memlernantoj



Post du jaroj establiĝis la Tutlanda Direkta Komisiono pri Superaeduka Ekzameno al Memlernantoj. Kaj de tiam oni disvastigis la ekzamenon al la tuta lando. En la fino de 1985 oni ekpraktikis ĝin en 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj. La ekzameno devas esti farita en 281 fakoj, inkluzive literaturon, natursciencon, teknikon, agronomion, medicinon, financ-ekonomion, politikon kaj edukon. La totala nombro de la sinanoncantoj superis milionon. Nun jam diplomitiĝis 11 400 personoj de Pekino, Tjanĝin, Ŝanhajo, Ljaŭning, Ĝjilin, Hejlongĝjang kaj Senŝji.



Kriplulino Du Hŭa en ekzameno de memlernantoj

EKZAMENO MALFERMA KAJ ELASTECA

La superaeduka ekzameno al memlernantoj estas bonvena al miliono da memlernantoj pro siaj malfermeco kaj elasteco. Ĝi donas bonŝancon lerni al ĉiuj lernemaj kaj diversprofesiaj ĉinoj vivantaj en malsamaj socimedioj, sen ajna kondiĉo de aĝo kaj lernohistorio. Laŭ statistiko, el la ekzamenatoj la malpli-ol-35-jaraj junuloj konsistigas ĉ. 80% — 90% de la tuto. El ili troviĝas ankaŭ maljunuloj 60-70-jaraj. La plejparto el ili estas kadroj, laboristoj kaj instruistoj kaj malgranda parto estas senlaboraj junuloj kaj kamparanoj.

La malfermeco de la ekzameno montriĝas ankaŭ en tio, ke ĝi akomodiga al ĉia memlernanto. Multaj junuloj ne havintaj la ŝancon lerni en altlernejo realigas sian deziron ĝuste pere de tiu vojo. Estas knabino en Tjanĝin nomata Ĝaŭ Jongĝŭo. Ŝi suferis de poliomjelito kaj estas kripla je ambaŭ gamboj. Ŝi partoprenis dufoje la enirajn ekzamenojn al altlernejo, sed pro la kripleco oni ŝin ne akceptis.

Ŝi tamen ne deprimiĝis. En 1977 ŝi komencis memlerni fremdan lingvon kaj sin veturigis ĉien per rulseĝo por konsulti kaj aŭskulti lekcionojn. En 1983 ŝi partoprenis en superaeduka ekzameno al memlernantoj, post du jaroj ŝi sukcese trapasis ĉiujn ekzamenojn de la Tjanĝin-a Fremdlingva Instituto kaj fariĝis la unua diplomita kriplulo en Tjanĝin.

La alia karakterizaĵo de superaeduka ekzameno al memlernantoj estas la elasteco. Estas tri specoj de la ekzamenoj: unu-lernoobjekta, kolegia kaj instituta. Krome la du lastaj povas interligiĝi per certaj komunaj lernoobjektoj kaj oni povas ricevi du diplomojn. La memlernantoj rajtas mem aranĝi siajn kursojn kaj stud-periodon, kio donas al pli multaj personoj ŝancon lerni.

Kompreneble, estas ne facile gajni diplomon pere de memlernado. Tio postulas persistecon, firmecon, diligentecon kaj ĝustan lernometodon. La lernantoj devas dediĉi pli multe da laboro kaj energio al lernado ol ordina-

raj studentoj por venki diversajn malfacilojn en laboro kaj familia vivo. Ili devas uzi la tutajn postlaborajn horojn por lerni, eĉ dum la oficaj vojaĝoj kaj veturado al laborejo. Ili devas elteni diversajn malsukcesojn. Se ili ne sukcesis en la unua ekzameno, ili devas ekzameniĝi duaŭ triafoje. Iuj memlernantoj sukcesis nur en la kvara ekzameno. Malgraŭ ĉio ĉi la memlernantoj ĝojas en la peniga memlernado. Iu lernanto diris: "Mi gajnis sciojn kaj diplomon en memlernado. Krome, plej grave estas ke ĝi levis mian animstaton kaj sciigis al mi, por kio oni devas vivi kaj labori."

Kiel nova formo de klerigado la ekzamenoj al memlernantoj havas ankaŭ iajn problemojn. Ekzemple, direktado al lernohelpaj aktivadoj estas ne bone aranĝita. Iuj organizoj estas ne fervoraj en subtenado al la memlernantoj, dum la memlerna kaj lernohelpa aktivadoj restas spontanee disvolviĝantaj. La ekzamena metodo devas esti plue reformita, ktp.

ILIA ASPIRO

En Ĉinio estas 40 000 000 profesiaj virinoj, pri kies aspirado, espero kaj ĉagreno en la kariero kaj vivo koncerna departemento faris specimenan enketon al 200 virinoj de 9 profesioj en Pekino, Tjanĝin kaj Ŝanhajo. El la 145 efikaj enketlistoj oni povas ricevi ĝeneralan konon pri tiuj virinoj.

KARIERO NECESA

De post la fondiĝo de la nova Ĉinio la nombro de profesiaj virinoj kreskis ĉiujare. Nun estas 41 980 000 oficistinoj kaj laboristinoj en la entreprenoj kaj institucioj de tutpopola posedanteco, 70-oble kiom tiuj en la unuaj jaroj post la Liberiĝo.

En la ĉi-foja enketo pri profesiaj virinoj troviĝas jena demando: "Ĉu vi ankoraŭ volus labori, se viaj familiaj ekonomiaj

kondiĉoj permesus al vi ne iri al laboro?" 76% de la demanditaj virinoj donis jesan respondon. Iuj virinoj diris klare: "Ni virinoj estas pli entreprenemaj." Evidente, ilia ĉefa motivo estas kontaktiĝi kun la socio, fariĝi homo povanta kontribui al la socio kaj akiri ekonomian sendependecon por kiel eble plej mal multe dependi de la edzo.

La 26-jara Liŭ Ŝjaŭĉing estas telefonistino de iu fabriko en Pekino. Ŝia edzo, taksi-ŝoforo, enspezas 300 jŭanojn monate. Sed Liŭ Ŝjaŭĉing ne volas forlasi la laboron por resti en la hejmo. Ŝi diris: "Nia familio povas vivi bone el la salajro de mia edzo kaj ne bezonas mian enspezon de dekoj da jŭanoj. Mi opinias, ke servi al la socio per laboro estas grave, ĉar la laboro de la edzino en la socio vekas ĉe

la geedzoj multe da komunaj paroltemoj kaj la edzino komprenas la edzon pli bone."

20% de la demanditaj virinoj estas inklinaj ne iri al la laboro, se eblas. Inter ili plejparte estas kelneroj. La ĉefa kaŭzo estas, ke mankas al ili tempo por zorgi pri la gefiloj kaj gemaljunuloj. La 31-jara kelnero Liŭ Gŭanglan respondis: "Se la ekonomiaj kondiĉoj estus favoraj al mi, mi volonte forlasus la laboron, ĉar mia labortempo estas tro longa, mi forestas de la hejmo de la 7-a kaj duono ĝis la 19-a."

Multaj oficistinoj kaj laboristinoj analizis la problemon laŭ la historio de virina emancipa movado, la signifo de homa vivo kaj sia propra travivaĵo. Iuj virinoj opinias, ke la signifo de homa vivo estas kreado kaj kontribuaĵo, kaj ke la virinoj post reveno al la familio perdos homan valoron kaj la egalrajteco de la viroj kaj virinoj fariĝos vanta.

Al la demando "Ĉu vi povas bone plenumi vian laboron?" 80% de la virinoj faris jesan respondon. Al la demando "Ĉu la virinoj estas malpli kapablaj ol la viroj en la socia laboro?" 86% de la virinoj respondas: "Ne-niom."

La enketo montris, ke la teknika nivelo kaj laborkapablo de virinoj estas preskaŭ egalaj al tiuj de la viroj. La procento de



*Ju Jin (meze),
taj-a kuracis-
tino en Ŝji-
ŝŭangbanna,
Junnan-provin-
co, ofte iras al
la kamparo
por kuraci kaj
preventi mal-
sanojn.*

la elstaraj lernantoj el la 370 diplomitaj studentinoj de Ĉinghŭa-universitato en 1982-1985 estis sama kiel tiu de la diplomitaj studentoj. El la esplor-studentoj akceptitaj de la universitato en 1985 virinoj konsistigis 21.9%.

URĜECO

Kun la profunda disvolviĝo de la ekonomia sistemo kaj scienc-teknika progreso de Ĉinio, altigi la kulturan kaj scienc-teknikan nivelon jam fariĝis la celo strebata de la virinoj. 82% de la demanditaj virinoj esperas lerni sur la nuna bazo kaj ricevi pli altan diplomon. Por tio ili eniris en diversajn teknikajn lernejojn, postlaborajn kursojn, televidan universitaton kaj korespondajn lernejojn. Inter ili estas laboristinoj, instruistinoj, inĝenierinoj, kuracistinoj, aktorinoj, servistinoj kaj aliaj. 7.5% de la demanditaj virinoj ne volas lerni plu.

Edziniĝis 106 el la demanditaj virinoj. Kvankam ili ĉagreniĝis pro la pezaj hejmlaboroj, tamen plejparto de ili persistas en memlernado. Ili legas librojn pri virina memkulturo, literaturo kaj fakaj scioj. 35% de la virinoj ofte legas librojn pri fakaj scioj.

La virinoj havas diversajn interesiĝojn. El la demanditaj virinoj 33% amas turismon, 30% legadon, 25% amuzan kaj sportan aktivadon kaj 10% tajloradon kaj trikadon. La virinoj deziras karieron, sukceson, honoron, kaj ankaŭ amon, infanon kaj amikecon. En la pasinteco ili ne atentis sian tualeton post nasko. Nun, ĉu vendistinoj kaj kasistinoj, ĉu oficistinoj kaj scienc-teknikistinoj, ĉiuj atentis vestadon kaj hararanĝon, belecon de aspekto kaj konduto.

La superklasa instruistino Hŭo Maŭĝeng diskutas kun sia edzo pri instrua materialo.



ĈAGRENO

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko oni abolis la leĝojn katenantajn kaj sklavigantajn la virinojn kaj publikigis novajn leĝojn defendantajn la virinajn rajtojn kaj interesojn. La konstitucio kaj edziĝa leĝo difinis, ke la virinoj ĝuas egalajn rajtojn same kiel la viroj. Tio ebligis al la virinoj radikalajn liberigojn.

Tamen, en la reala vivo kun malnovaj kutimoj kaj moroj, iuj profesiaj virinoj iatempe trovis neegalecon inter la viroj kaj virinojn.

Al la demando "Ĉu la viroj kaj virinoj havas egalajn ŝancojn en lerneja enira ekzameno kaj enoficigo" 94 virinoj (65%) donis nean respondon. Al la demando "Ĉu vi suferis neegalan traktadon pro seksa diferenco" la 24-jara laboristino Ju Ŝjamej respondis: "Mi suferis tian traktadon, kiam mi partoprenis en ekzameno por labori en fabriko. Ekz., oni akceptis nur tiujn virinojn, kiuj devis gajni pli ol 160 poentojn, sed virojn gajnintajn nur 100 poentojn. Kaj krome, oni akceptis 100 virojn, sed nur 20 virinojn." Alia laboristino Caŭ Bingŝja skribis: "Fininte la lernadon

en supera mezlernejo, unuafoje mi partoprenis en ekzameno por fariĝi laboristino. Kvankam mia ekzamena rezulto estis bona, tamen la fabriko ne akceptis min. Ĝi akceptis virojn, kies poentoj en la ekzameno estis malpli multaj ol miaj. Tio estis akcepti virajn anstataŭ la elstarajn."

Iuj el la demanditaj virinoj plendis, ke ili havis ŝancojn de trejniĝo kaj lernado malpli ofte ol viroj. Iuj oficistinoj kaj scienc-teknikistinoj diris, ke ilia ŝanco por promociiĝo estas malpli ofta ol tiu de viroj.

Ĉio ĉi estas kaŭzita de la feŭdisma ideologio de gvidantoj de iuj departementoj.

Sed ĝenerale plejparto de la profesiaj virinoj ĝuas saman traktadon kiel la viroj. Tio montriĝis en la demando "Ĉu la viroj kaj virinoj ĝuas egalajn rajtojn?" 119 (82%) donis jesan respondon kaj 22 (15%) respondis: "Malpli ol la viroj."

Pezaj hejmlaboroj estas alia problemo ĉagrenanta la profesiaj virinojn. Ĉiutage ĉi tiuj devas fari hejmlaborojn je 3-4 horoj pli longe ol viroj. Tial 69% de la virinoj esperis redukti tian ŝarĝon. Jen komuna voĉo de multaj virinoj.

LUCIANO PAVAROTTI EN PEKINO

de ĈEN BAŬHE kaj ĜENG ĜIN

De la 24-a de junio ĝis la 5-a de julio, 1986, kiel gasto la itala tenoro Luciano Pavarotti, kiu ĝuas admiradon de la oper-aman-toj en la mondo, estis varme bon-venigata de la pekinaj meloma-noj. Per sia magia voĉo kun fascina beleco la monda majstro de muziko, honorita kiel "Reĝo de Alta C", kondukis la ĉinajn melomanojn en mirindan artan mondon.

La fame konata kantisto venis al Ĉinio laŭ interkonsento pri kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Italio. Kune kun li venis al Ĉinio ankaŭ 210 geaktoroj de la itala Genoa Opera Trupo. Dum

restado en Pekino ili faris kvin-foje prezentadon de "La Bohe-me", kaj Pavarotti faris du re-citalojn por la ekscititaj ĉinaj aŭskultantoj. Ĉiufoja prezen-tado estis brile sukcesa, kaj la majstro plurfoje diris, ke la var-ma respondo de la ĉinaj aŭskul-tantoj estas ekster lia atendo.

Kiel festo la vizito de Pavarot-ti vigligis la ĉinajn operajn ron-dojn kaj ankaŭ la voĉmuzikajn rondojn. Eŭropa opero, precipe itala opero, ne estas fremda por la ĉinaj operaj rondo kaj oper-amantoj. Ĉinaj radio-stacioj ofte disaŭdigas okcidentajn operojn, kaj la grandaj operaj trupoj de

Ĉinio ofte prezentas la vaste konatajn operojn "La Traviata", "Damo Papilio", "Karmen" k. a. Multaj ĉinaj kantistoj ŝatas kanti en koncerto famajn ariojn el okcidentaj operoj.

Eble ĝuste pro tio, ke okci-dentaj operoj ne estas fremdaj por la ĉinaj aŭskultantoj, al la opera majstro ili havas ne nur respekton, sed ankaŭ sentas in-timecon. Jam duonmonaton antaŭ la alveno de la majstro, mul-taj en Pekino kaj aliaj lokoj klo-podis por mendi biletojn ĉe la Ĉina Impresario por Eksterlanda Prezento. Multaj vicatendis unu tagon kaj unu nokton ĉe la ĝiĉeto. Eĉ la pluvego ne povis forpeli ilin. Vespere de la 24-a de junio okazis la unua prezen-tado. Multaj atendis ekster la teatro por akiri eventuale redonitan bileton. Iuj el ili atendis preskaŭ ĝis la fino de la prezen-tado, admirata de la spektantoj.

Dum restado en Pekino, kiel la plej eminenta reprezentanto de la moderna itala opero, Pava-rotti montris al la ĉinaj spektan-toj la italan operan arton prifie-ratan de la itala popolo, kaj sam-tempe aprecis kun granda inte-reso ĉinan tradician pekin-ope-ron. Geaktoroj de la Pekina Pekin-opera Trupo prezentis por Pavarotti scenojn el la ĉinaj tra-diciaj teatraĵoj. Pavarotti de tempo al tempo faris laŭdon pro la prezentado kaj kelkfoje svin-gis la manojn por imiti la mo-



S-ro Luciano Pava-rotti en la Popola Halo en Pekino

S-ro Luciano Pavarotti en la Centra Konservatorio en Pekino



vojn de aktoroj. Laŭ lia peto oni ŝminkis lin kiel ĉefrolulon en iu ĉina tradicia teatraĵo. En rolula vesto li geste kantis, kio ridigis ĉiujn ĉeestantojn. Koncerne al la ĉinaj pekin-operaj aktoroj pri la karakteroj de la itala opero kaj la ĉina pekin-opero, Pavarotti diris, ke la pekin-opero estas la plej eminenta reprezentanto de la ĉinaj tradiciaj artoj kun profunda arta mondo kaj meditiga forto. Li

diris, ke estas granda perdo viziti Ĉinion sen spekti pekin-operon.

En Pekino Pavarotti vizitis ankaŭ la Centran Konservatorion kaj ĝian dependan mezlernejon. Lernantoj ludis por li ĉinanacian muzikon. Li direktis tri studentojn, kiuj lernas okcidentan voĉmuzikon en la konservatorio, en kantado de ario en la itala opero. Li informis la ĉeestantojn, ke post nelonge li ludos

operon kune kun ĉina mezo-soprano Ljang Ning.

La vizito de Pavarotti, la unua el la 10 mondfamaj tenoroj, estis mallonga, sed lia fascina voĉo kaj arta prezentado, kiun li ludis, por ĉiam restos en la memoro de la ĉinaj spektantoj. Kaj krome, kiel iu ĉina voĉmuzikisto diris, la prezentado de Pavarotti kaj la Genoa Opera Trupo akcelos la voĉmuzikon kaj operon de Ĉinio.



S-ro Luciano Pavarotti ludas la ĉinan blovinstrumenton ŝeng-o.

KURANTAJ AFEROJ

URBETAJ PRODUKTAJOJ EKSPORTITAJ DE ĈINIO EN POTENCA KRESKADO

La totala produktovaloro de la ĉinaj urbetaj entreprenoj en 1985 atingis 272.8 miliardojn da ĵuanoj kaj gajnis por la ŝtato 4 miliardojn da usonaj dolaroj. En la unua duono de la kuranta jaro la industria produktovaloro de la ĉina kamparo pliiĝis je 19%, kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

Ĉinio havas pli ol 8 000 fabrikojn, kiuj produktas eksportaĵojn,



Ŝufara aŭtomacio en vilaĝo de Ĝeĝjang-provinco

kaj el kiuj estas 870 urbetaj entreprenoj funkciigataj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

KOLORAJ TELEVIDILOJ DE ĈINIO EN EŬROPO

Estas bonvena en Britio la 14-cola kolora televidilo kun marko Hŭanĵu (tipo: 37C-2), ĉefe el ĉinaj elementoj, produktita de la Ŝiĝjaĝŭang-a Televidila Fabriko de Hebej-provinco.

En aprilo ĉi-jare, dum restado en Ĉinio s-ro Vance, la ĝenerala direktoro de la Londona Televidilvenda Kompanio, multe interesiĝis pri tia televidilo. Li kontraktis kun

la fabriko pri mendo de 2 200 tiaj televidiloj kaj kunportis al Britio 9 televidilojn kiel specimenojn el ĝia staplo. La nacia kvalito-ekzamena institucio de Britio konstatis post ekzameno, ke ĝia kvalito konformas tute al la koncernaj normoj de Britio. Lastatempe s-ro Vance refoje vizitis Ĉinion, subskribis plian kontrakton pri mendo de 27 800 tiaj televidiloj kaj esprimis sian deziron daŭre kunlabori kun la fabriko.

NOVA SPECIO DE SOJFABO

Post pli-ol-dek-jara esplorado sciencistoj de la Nordorienta Agronomia Instituto elkulturis novan specion de sojfabo unuaran-

gan en la mondo — sojfabo Dongnong 36.

La specio karakteriziĝas ĉefe per sia maturiĝa periodo de 80-90 tagoj, kiu estas pli mallonga ol tiuj bonaj frumaturiĝaj specioj de Kanado, Usono kaj Sovetio. Ĝi entenas meznombre 45.54% da proteino, je 1.77-4.93% pli multe ol la supre menciitaj bonaj specioj alilandaj.

NOVA ATINGO EN KURACADO DE GIGANTA OSTĈELA TUMORO

La fako pri ortopedia ĥirurgio de la Unua Hospitalo sub la Kvara

Milita Medicina Universitato iniciatis novan terapion por forskrapi tumoran fokuson per bruligo de malsana interna ostosurfaco per 50% de zinka klorido kaj plantado de nova osto. La kuracefiko atingis avangardan nivelon internacie.

La giganta ostĉela tumorato estas malfacile kuracebla malsano. Dum longa tempo ĉinaj kaj eksterlandaj kuracistoj kuracis la tumoron per forskrapo de la fokuso aŭ per transplantado de osto post forskrapo. Per tiaj terapioj oni povas sukcese kuraci nur 30% da malsanuloj.

La estro de la fako prof. Lu Jupu trovis post longa esplorado kaj praktikado la supre menciitan terapion bonefika. Kaj oni sukcesis kuraci 43 el 48 malsanuloj, je 89.6% de la tuto.


LA INTERNACIA SIMPOZIO DE ĈINA MODERNA LITERATURO

Je la komenco de novembro okazos en Ŝanhajo la unua internacia konferenco de ĉinologoj — la Internacia Simpozio de Ĉina Moderna Literaturo, sub la aŭspicioj de la Ĉina Verkista Asocio.

Kiel gastoj de Ĉinio, diverslandaj ĉinologoj, kiuj bone scias pri la ĉina literaturo kaj faris rimarkindan kontribuon por enkonduki ĝin en la mondon, renkontiĝos kun ĉinaj verkistoj kaj recenzistoj, konitaj en ĉinaj literaturaĵoj, kaj kune studos pri la nuna stato kaj perspektivo de la ĉina moderna literaturo. Ili prezentos diversajn opiniojn pri la temo "Kiel mi rigardas la ĉinan modernan literaturon".

La aktivado donos ŝancon al la ĉeestantoj profundigi sian konon pri la ĉina moderna literaturo, precipe pri la literaturo en la nova epoko kaj pluapase akcelos la interŝanĝon de la ĉina kaj monda literaturoj.

Krom famaj ĉinaj verkistoj kaj recenzistoj, ĝin ĉeestis ankaŭ ĉino-



Jadaj pendaĵoj kaj braceletoj elterigitaj en Niŭheljang-ruino de Ljaŭning-provinco

lojoj el Usono, Kanado, Italio, Svisio, Svedio, Francio, Britio, FR Germanio, Aŭstrio, Aŭstralio, GDR, Sovetio, Rumanio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Japanio kaj aliaj landoj.

BENEFICA PREZENTADO POR AFRIKAJ PLAGITOJ

Vespere de la 28-a de julio, 18 000 spektatoroj en la Ĉefurba Sporthalo ĝuis benefican prezentadon dediĉe al afrikaj plagitoj. Ankaŭ diplomatoj kun siaj edzinoj de afrikaj ambasadorejoj en Ĉinio kaj afrikaj studentoj en Pekino estis invititaj al ĝi.

Ekde 1982, la afrikan kontinenton atakas trosekeco kaj malsatego plej grandaj en la nuna jarcento. En Ĉinio oni faris diversajn popolamasajn aktivadojn por kolekti monon kaj monhelpi la afrikajn plagitojn.

La benefica prezentado okazis sub la aŭspicioj de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, Ĉina Sporta Federacio, Ĉina Asocio por Interŝanĝi Kulturon kun Aliaj Landoj, Ĉina


Federacio de Junuloj, Ĉina Federacio de Studentoj, Ĉina Societo de Ruĝa Kruco kaj Amika Asocio de la Ĉina kaj Afrika Popoloj.

La tuta enspezo de la prezentado estis oferita al la afrikaj plagitoj.

RUINO DE KULTURO EN LJAŬNING ANTAŬ 5 000 JAROJ

En la montaro de la okcidenta Ljaŭning-provinco, Ĉinio, estas trovitaj pli-ol-5 000-jaraj granda oferaltaro, templo de diino kaj

Jaspa ekrano



ŝtonaj tomboj. Laŭ la elterigitaj historiaj objektoj arkeologoj asertis, ke antaŭ 5 000 jaroj tie estis primitiva civilizita socio kun rudimenta formo de ŝtato. La grava eltrovo plifruigis la civilizitan historion de Ĉinio je pli ol 1 000 jaroj. Oni trovis konkretajn objektojn por atesti ekziston de "Tri Suverenoj kaj Kvin Imperiestroj" en antikva legendo. Tio certe donos gravan influon al la studo de la historioj de primitiva socia disvolviĝo, ideologio, religio, arkitekturo kaj belarto de Ĉinio.

MILOJ DA SURROKAJ PENTRAĴOJ TROVITAJ EN ŜINGĴANG

En la pasintjara aprilo arkeologoj de Ŝingĵang trovis milojn da surrokaj pentraĵoj en Kunlun-montaro dum sia arkeologia esplorado. Post ripetada esploro oni konstatis, ke ili estas kulturajoj postlasitaj de antikvaj nomadaj triboj en Ŝingĵang. La pentraĵoj havas historion de 6 000 — 8 000 jaroj. Ili figuras bestojn, homojn, ĉasajn scenojn kaj diversajn signojn. La pentraĵoj bele kaj plastike faritaj havas sufiĉe altan sciencan kaj kulturan valoron.

LA PLEJ GRANDAJ JASPAJ EKRAĴOJ EN LA MONDO

La du plej grandaj jaspaj ekranoj en la mondo kun temo de la ĉina klasika romano "Songĝo en Ruĝa Buduaro" estas skulptitaj en la Pekina Jadaĵa Fabriko.

Jaspo estas malhele verda jado. La du ekranoj estis skulptitaj el granda jaspaj bloko peza je 27 tunoj.

LA MEZNOMBRA VIVDAŬRO DE ĈINOJ ATINGIS 68 JAROJN

La meznombra vivdaŭro de la ĉinoj kreskis de 35 jaroj en 1949 ĝis 68 jaroj nun. La mortokvanto malkreskis de 25‰ ĝis 6.6‰. La mortokvanto de beboj de 200‰ ĝis 34.68‰. La supre diri-

taj indikoj proksimiĝis al tiuj de la evoluintaj landoj.

VIOLONISTO ŜJŬE ŬEJ PREMIITA INTERNACIE

La ĉina 23-jara violonisto ŜjŬe Ŭej gajnis la duan lokon en la violona ludo de la Oka Internacia Ĉajkovskija Muzika Konkurso en Moskvo, la 2-an de julio. Poste, la 17-an de julio li gajnis la unuan lokon kaj du premiojn de plej bona ludo en la Dekaj Karfleŝa Internacia Violona Konkurso en Londono.

LA ĈINA MATEMATIKA TEAMO PREMIITA INTERNACIE

Ses mezlernejoj el la ĉina matematika delegacio partoprenis en la 27-a Internacia Matematika Konkurso okazinta en Varsovio, Pollando. Tri el ili gajnis la unuan premion, unu la duan premion kaj alia la trian premion.

La Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio, Ĉina Scienca kaj Teknika Komisiono kaj Ĉina Eduka Komisiono klopodos post interkonsiliĝo akiri la rajton okazigi en Ĉinio la internacian matematikan konkurson en 1989.

NOVAJ ATINGOJ DE ĈINAJ SPORTAJ AKROBATAĴOJ

Gajninte tri orajn medalojn kaj unu arĝentan medalon en la 15-a Internacia Invit-turniro de Sportaj Akrobataĵoj en Jambolo de Bulgario, la ĉinaj akrobataĵaj sportistoj gajnis kvar orajn medalojn de vira unuopa, virina unuopa, vira duopa kaj vira kvaropa ludoj kaj unu arĝentan medalon de gea duopa ludo en tia konkurso en Kjustendilo de la lando partoprenata de kvar landoj. En la du konkursoj ĉina sportisto Li Jonghuj estis la plej elstara en la vira unuopa ludo kaj gajnis specialajn premiojn de la plej bona ludo en ambaŭ konkursoj. Ĉinaj sportistoj gajnis premion de ludo ekstreme malfacila en la vira kvaropa ludo.

LA CAMAGŬEY-A BALETA TRUPO DE KUBO EN PEKINO

La Camagŭey-a Baleta Trupo de Kubo, gvidata de la fama dancisto kaj edukisto Fernando Alonso, turneis en Pekino je la fino de julio. Ĝi estis la unua el Kubo, kiu vizitis Ĉinion en la pasintaj 20 jaroj. La Camagŭey-a Baleta Trupo estas unu el la plej elstaraj baletaj trupoj de Kubo. Iuj trupoj estas premiitaj en internacia baleta festivalo.

La bela dancado de la kubaj baletistoj estis varme bonvenigataj de spektatoroj.

ANONCO

Por kontentigi la bezonon de diversaj Esperantaj organizoj, bibliotekoj kaj gesamideanoj, oni pretigis jarkolektojn de EPC por 1984 kaj 1985. Ĉiu jarkolekto kostas 12 usonajn dolarojn, mendebla ĉe la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN). Adreso: P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

KOREKTO

Legu "jardekoj" anstataŭ "jarcentoj" sur paĝo 24, dekstra kolumno, 3-a alineo, 2-a linio de malsupre, n-ro 9.

INTERNACIA SIMPOZIO EN TOKIO

Tuj post la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, okazis Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto en Tokio, de la 5-a ĝis la 7-a de aŭgusto, 1986. Ĝi estas socilingvistika simpozio organizita de Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploro kaj dokumentado pri Monda Lingvoproblemo) kaj Japana Esperanto-instituto kaj aŭspiciita de Japana Ministerio pri Edukado, Japana Nacia Unesko-Komisiono, Japana Federacio de Unesko-Asocioj kaj la famekonata japana ĵurnalo Asahi Sinbun. Esperanto kaj la japana lingvo estas laborlingvoj de la simpozio en samtempa interpretado.

Estas faritaj en la simpozio entute 12 prelegoj pri diversaj socilingvistikaj temoj fare de 12 personoj el ok landoj. Prelegis Prof. Tanaka Katuhiko (Japanio) pri "Naciaj lingvoj kaj internacia lingvo — Memstareco de etnaj (nefortaj) lingvoj kaj ebleco de (artefarita) internacia lingvo", Prof. Humphrey Tonkin (Usono) pri "Esperanto kaj la angla lingvo — du lingvoj kun diversaj celoj", Prof. Chen Yuan (Ĉinio) pri "Multlingva socio: interlingvo aŭ komunlingvo kaj

internacia lingvo — specife pri ĉina situacio", Prof. Paul K. Eguti (Japanio) pri "Problemoj pri internacia lingvo el la vidpunkto de Afrika mondo", Prof. Helmar Frank (FR Germanio) pri "Utileco de la Internacia Lingvo kiel pontlingvo kaj referenclingvo por edukado kaj scienca komunikado", Prof. Kanno Hiroomi (Japanio) pri "Pozicio de la korea lingvo en la lingva edukado en Azio — kunlige al internacia lingvo", Prof. Peter Forster (Britio) pri "Ĉu (artefarita) internacia lingvo estas revo neatingebla? Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado", Mag. Tibor Sekelj (Jugoslavio) pri "Ĉu la socio bezonas la internacian lingvon?", Docento Gotoo Hitosi (Japanio) pri "Interlingvistikaj diskutoj en la historio de lingvistiko", Prof. Detlev Blanke (Germana DR) pri "Socipolitikaj influoj kaj la Internacia Lingvo — Ĉu socisistemaj kaj politik-ideologiaj diferencoj reflektiĝas en Esperanto aŭ kreas lingvo-variantojn?", S-ro Zhang Qicheng (Ĉinio) pri "La evoluo de Esperanto kaj lingva neŭtraleco" kaj Prof. Claude Piron (Svislando) pri "Nacieco kaj internacieco de Esperanto".

Pli ol 150 aŭskultantoj (inkluzive de neesperantistoj) ĉeestis la simpozion. Okazis viglaj diskutoj inter prelegantoj kaj aŭskultantoj kaj ankaŭ libera interamikiĝo kaj opiniinterŝanĝo inter la prelegantoj. Intervjuoj estas faritaj de japanaj ĵurnalistoj al diversaj prelegantoj.

La simpozio estas plene sukcesa kaj oni esperas, ke tiaspeca simpozio okazos de tempo al tempo.



**PEKINA VETERANA
ESPERANTISTA ASOCIO
FONDITA**

Zorgate de vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR Huang Hua kaj Chu Tunan, la Pekina Veterana Esperantista Asocio (PVEA) oficiale fondiĝis la 12-an de julio, 1986 en Pekino.

En la fondkunveno de la asocio, la ĉ. 60 ĉeestantoj unuanime aprobis la statuton de la asocio. La kunveno petis, ke Huang Hua, Chu Tunan kaj Guo Xianrui estu honoraj prezidantoj de la asocio, ke Cao Ying, Lu Xuzhang, Ye Laishi, Chen Yuan, Zhang Qicheng, Yuan Chaojun, Lou Shiyi, Ge Baoquan, Zeng Heyao kaj aliaj 19 famaj veteranaĵoj kaj Esperanto-subtenantoj estu konsilistoj de la asocio, elektis faman verkiston kaj tradukiston Ye Junjian kiel prezidanton de la asocio, famajn veteranaĵojn esperantistojn Chen Shide, Tang Xun'an, Li Yi, Sha Di kiel vicprezidantojn kaj Zhang Zigang kiel ĝeneralan sekretario.

La kunveno aprobis decidojn ke la revuo "Veterana Esperantisto" estas organo de PVEA. Antaŭ tio ĝi jam aperigis kvar numerojn.

PVEA estas amasa organizo. Ĝia ĉefa celo estas konservi kaj disvolvi la gloran revolucionan tradicion de la ĉinaj veteranaĵoj esperantistoj, kulturi talentulojn por la socialisma konstruado de Ĉinio kaj daŭrigantojn de la Esperanto-movado, starigi pacaĵon kaj amikan rilaton kun diverslandaj esperantistoj kaj fortigi interŝanĝon de eduko, scienco kaj kulturo en Esperanto, konsultan servon k.a.

Post sia fondiĝo la asocio faris energian aktivadon, inkluzive de partopreno en la 71-a UK.

**ĈINAJ ESPERANTISTOJ
PARTOPRENIS LA JAPANAN
KONGRESON**

La 73-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj kun pli ol 400 aliĝintaj gekongresanoj okazis de 9-a — 10-a de aŭgusto ĉi-jare en Osaka. Samideanoj Chen Yuan kaj Zhang Qi-cheng, respektive vic-prezidanto kaj ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, partoprenis la kongreson kiel invititaj gastoj. En

la nomo de Ĉina Esperanto-Ligo, Chen Yuan salutis la kongreson kaj donacis ekzempleron de la nove eldonita "Ĉina Antologio" al la prezidanto de la kongreso kiel memoraĵon.

En la kongresa universitato prelegis Chen Yuan pri la simpligo de ĉinaj ideogramoj kaj Zhang Qi-cheng prelegis en publika kunveno (kun neesperantistaj ĉeestantoj) pri la temo "Kial Esperanto Nun Furoras en Ĉinio?"

La kongreso finiĝis je la vespero de la 10-a, kun tipe japan-stila bankedo, en gaja etoso de internacia amikeco.

Antaŭ la kongreso, s-roj Chen kaj Zhang veturis de Tokio al Nagoja kaj tie prelegis Chen Yuan pri la sama temo, pri kiu li prelegis en la Internacia Lingvistika Simpozio okazinta en Tokio.


Post la kongreso, s-ro Chen revenis hejmen pro urĝa afero kaj s-ro Zhang daŭrigis sian vojaĝon en Japanio, al kiu li havis la unuafojan viziton. Li estis gastigita en Kameoka de la Esperanto-propaganda Asocio de Oomoto kaj en Nagoja de la Nagoja Esperanto-Centro. En ambaŭ urboj, li estis varme bonvenigita kaj afable prizorgita de japanaj samideanoj, kaj dank' al iliaj gastamaj helpoj, li vizitis ankaŭ la famajn urbojn Kioto kaj Nara kun granda plezuro. Antaŭ sia foriro, li estis invitita al bankedo aranĝita de la estraranoj de Japana Esperanto-Instituto kaj havis tre amikan interparolon kun siaj japanaj gastigantoj.

**ESPERANTO EN
INFANĜARDENO**

En la urbo Ĉangĝji de la Ŝingĵang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas 26-jara universitata diplomita studentino Ma Liĝĵuan. Ŝi starigis privatan infanĝardenon. En la infanĝardeno estas pli ol 130 infanoj. Krom infanaj instruaj lecionoj difinitaj de la ŝtato Ma

Fondiĝis PVEA.





Esperanto-kurso en "EI"-NIS, Jugoslavio

Liĝjūan instruis Esperanton al 5-6-jaraj infanoj. Post duonjara lernado la infanoj povas fari simplan interparolon en Esperanto kaj parkere voĉlegi infankantojn.

RENKONTIĜO EN PEDAGOGIA ALTLERNEJO

De la 4-a ĝis la 10-a de aprilo 1986, gestudentoj-esperantistoj en pedagogia altlernejo en la urbo Piotrków Trybunalski, Pollando gastigis esperantistan grupon de gestudentoj kaj instruistoj el pedagogia altlernejo en Eger, Hungario, gviditan de s-ino Doc. Viktória Balogh.

Krom amikaj kontaktoj ili interŝanĝis siajn sciojn kaj spertojn pri pedagogiaj temoj kaj pri instruado de Esperanto en bazlernejoj. La unua renkontiĝo de ili okazis en oktobro 1985 en Eger dank' al invito de la hungaraj geamikoj.

GRAVA ANONCO DE ELDONEJO KAJ LIBREJO "SONORILO"

Ekde julio 1986 la esperantistoj, kiuj loĝas en la nederlandlingva parto de Belgio, povas mendi

Esperantajn librojn ĉe normala librovendejo, ĉar ekde tiu ĉi jaro tiu ĉi eldonejo kaj librejo estas oficiala registrita asocio. Nun la normala librejo akceptas nur mendojn de Esperanto-libroj.

ESPERANTO EN "EI"-NIS

En elektronika industrio "EI"-NIS, la plej granda tiaspeca firmo en Jugoslavio, ekzistas jam de multaj jaroj Esperanto-agantoj. La elstaraj esperantistoj Jovan Jan-koviĉ kaj Jovan Neŝiĉ jam gvidis tie Esperanto-kursojn antaŭ 6 jaroj. Ili ankaŭ organizis tre sukcese kelkajn ekspoziciojn pri E-literaturo, korespondaĵo kaj memoraĵoj en la industrio. La lastan vizitis pli ol 20 000 homoj.

NOVA ESTRARO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRAZILO

La 31-an de majo ĉi-jare estis elektita nova estraro de Esperanto-Asocio de Brazilo — EAB, por la periodo 1986-1988. Prezidanto: Neima Adorno; vicprezidanto: Afonso Camboim; sekretario: Fátima Pires; kasisto: Roberto Ferreira.



Nova estraro de la Esperanto-Asocio de Brazilo

PERIODAĴOJ DE ĈINIO



La Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio proponas al vi jenajn revuojn, kiuj liveros al vi informojn en la politika, ekonomia kaj aliaj kampoj de Ĉinio.

“Ĉinio”, granda monata bildgazeto kun teksto en la ĉina, angla, germana, franca, hispana, rusa, japana, araba, sveda, svahila, itala, urdua kaj aliaj sep lingvoj, 48 p., formato: 33 × 25.5 cm.

“Pekina Revuo”, semajna politika revuo en la angla, franca, germana, hispana kaj japana lingvoj, 34 p., formato: 26 × 19.5 cm.

“Ĉinio en Konstruado”, ĝenerala monata gazeto en la ĉina, angla, franca, hispana, araba, portugala kaj germana lingvoj, 76 p. formato: 26 × 19.5 cm.

“Popola Ĉinio”, monata gazeto en la japana lingvo, 134 p., formato: 26 × 18.5 cm.

“Ĉina Literaturo”, trimonata gazeto en la angla kaj franca lingvoj, ĉ. 220 p., formato: 21.5 × 14 cm.

“Women of China”, monata gazeto en la angla lingvo, 48 p., formato: 26 × 21 cm.

“China Sports”, monata gazeto en la angla lingvo, 60 p., formato: 26 × 18.5 cm.

“Ŝanhajo en Bildoj”, dumonata gazeto en la ĉina kaj angla lingvoj, 44p., formato: 30 × 22.5 cm.

“Ĉina Ekstera Komerco”, monata gazeto en la ĉina, franca kaj hispana lingvoj, formato: 28 × 21 cm.

“China Philately”, dumonata gazeto en la angla lingvo, 52 p., formato: 26 × 18.5 cm.

“China’s Screen”, trimonata gazeto en la angla lingvo, ĉ. 38 p., formato: 30 × 22.5 cm.

“Social Sciences in China”, trimonata gazeto en la angla lingvo, ĉ. 240 p., formato: 26 × 18.7 cm.

“Chinese Medical Journal”, monata gazeto en la angla lingvo, ĉ. 75 p., formato: 26 × 18.5 cm.

Donaco

La kompanio preparis por la abonantoj kaj abonvarbantoj donacojn en tradicia ĉina stilo. Ĉiu, kiu abonos la supre menciitan gazeton de la 1-a de oktobro 1986 ĝis la 28-a de februaro 1987, povos ricevi tian donacon. La abonvarbantoj ricevos similan donacon laŭ sia kontribuo en la varbado.

* Donacoj akireblaj nur por alilandaj legantoj.

* Ĉinaj legantoj abonu ĉe loka poŝtoŝeĵo.

Alilandaj legantoj abonu ĉe peranta librejo en sia lando aŭ rekte ĉe la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN).

Adreso: P.O. Kesto 399, strato Chegongzhuang-xilu n-ro 21, Beijing, Ĉinio



Esperantistetoj

第71届

8.15.86

国际世界语大会



北京 1986
7·26-8·2